

revuo

esperanto

marto 1966

59-a jaro

n-ro 724 (3)



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 41 La politika uzo de Esperanto (V.S.)
- 42 La instruisto fariĝu reĝisoro (Pettyn)
- 44 Grajnoj en Vento 10-jara
- 47 Subskriboj: restas nur mallonga tempo!
- 48 En la ĉirkaŭaĵo de Graz
2-a Internacia Konferenco de Lernejoj
- 50 "Lasta paŝo" (Szabó)
- 51 Leteroj
Nekrologoj Bovet, Christensen
- 52 CED
- 54 Recenzo
Resumoj
Ricevitaj eldonaĵoj
- 55 Mallongaj novaĵoj
- 56 La Juna Vivo
- 57 51-a Universala Kongreso, Budapeŝto, 1966
52-a U.K., Tel Aviv, 1967 (karavano de UEA)
- 58 Laŭlanda membro-statistiko 1965
Komentoj pri la statistiko
- 59 Esperanto en radio
- 60 Oficiala informilo n-ro 388

kovrila bildo

Internacia etoso de la 9-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo (Vidu p. 56). De maldekstre: Shooko Horie; Ibrahim Tambura; la prezidanto de UEA; Jeanne Marie Liouville; Eliza Weide. (Foto: Conti-Press, Hamburg)

bildojn liveris

- 55 (Supre) František Kubica; (malsupre) Ĥaris Feleris

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Girkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1966): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 83 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

esperanto
marto 1966

En la februara eldono de "Esperanto" la legantoj povis trovi ekzemplojn de la maniero, kiel oni kelkfoje atakas kaj misprezentas la neŭtralecon de UEA. Kiel ni tie (p. 25) klarigis, tiu neŭtraleco estas fiksita jam en la Statuto de UEA, kiu same preskribas la neŭtralecon de la revuo "Esperanto". Sed tio neniel signifas, ke UEA kontraŭas la uzadon de la Internacia Lingvo por ne-neŭtralaj celoj. Denove laŭ sia Statuto, UEA povas kunlabori kun ne-neŭtralaj organizaĵoj. Oni pensu nur pri la kunlaborantaj religiaj organizaĵoj: BLE, IKUE, KELI kaj KES. Same la revuo "Esperanto" publikigas laŭ senpartia maniero informojn pri, ekzemple, religiaj kaj politikaj eldonaĵoj.

Ni ja ne apartenas al tiu alia ekstremo, kiu volus iel 'malpermesi' la uzon de Esperanto por politikaj celoj. Iu membro de tiu skolo skribis lastatempe, ke "nun ni havas eĉ esperantan ekstreme dekstran gazetaĉon, per kio oni miskreditigas Esperanton kaj honestajn esperantistojn." Ĉu la fakto, ke ekzemple en la korea lingvo aperas politikaj gazetoj, senkreditigas la korean lingvon kaj honestajn koreojn? Tion ĝi povus fari sole nur antaŭ malkleraj aŭ naivaj personoj, kiuj ne scipovas distingi inter abstrakta lingvo kaj konkreta teksto.

Esperanton oni utiligis por politikaj celoj jam de tre frue en ĝia historio, kaj de tiam tiam uzo ne ĉesis. Jam en 1905 komencis aperi pacifista literaturo: aro da broŝuroj kaj revuo "Espero Pacifista", kiun redaktis Gaston Moch. Baldaŭ sekvis pluraj klasbatalaj gazetoj, kaj en 1908 la unua eldono de la Komunista Manifesto de Marks kaj Engels. Dum la Unua Monda Milito la germana registaro eldonadis dusemajnan ilustritan gazeton "Internacia Bulteno" (1914-19), en kiu ĝi prezentis sian vidpunkton pri la milito. Samtempe aperadis primilitaj broŝuroj, ankaŭ flanke de la francaj ŝtataj instancoj.

En la intermilita periodo tre multiĝis la komunisma literaturo. "Ŝtato kaj revolucio" de Lenin aperis en 1926, lia "Pri religio" en 1929, samjare kun "Pri Lenin" de Stalin. "Kulturo nacia kaj internacia" de Stalin sekvis en 1930. Dum proksimume dekjara periodo en la dudekaj kaj tridekaj jaroj aperadis granda kvanto da politikaj broŝuroj eldonitaj en Leipzig kaj Moskvo, ĉi-lastaj sub la titolo "Komunista Biblioteko". La kulmina eldono de la verkaro de Lenin, jam tiam anoncita, tamen abortis. Ankaŭ SAT disvolvis rimarkindan eldonagadon en tiu periodo. Ankoraŭ antaŭ la Dua Monda Milito aperis du verkoj de Mussolini kaj "La laborista klaso kontraŭ la faŝismo" de Georgi Dimitrov.

Dum la trijara hispana milito (1936-39) respublikanoj en Barcelona eldonis ilustritan gazetan bultenon en Esperanto. Ĝin sekvis (1939-1944?) "Heroldo de Ĉinio", bulteno pri la kontraŭjapana milito. En 1940 aperis 216-paĝa volumo da milittempaj mesaĝoj de Ĉiang kajŝek.

Samtempe ankaŭ la japanaj aŭtoritatoj diskonigis siajn vidpunktojn per broŝuroj en Esperanto.

Ĉu ĉio ĉi senkreditigis Esperanton? Ĉu ĝi ne estas pli ĝuste elokventa atesto pri la vivanteco de la lingvo kaj pri ĝia travivemo tra ĉiuj militoj kaj politikaj renversiĝoj? En ĉiu okazo, postuli ĝian ĉesigon signifus nur sin mem senkreditigi per sia naiveco. Ŝtatoj havas la povon, malaŭdebligi radioelsendojn (iuj jam tion aplikas kontraŭ la Esperanto-elsendoj de Radio Pekino), konfiski presaĵojn (kiel diversaj jam faris kaj faras kontraŭ eldonaĵoj en Esperanto), cenzuri korespondaĵojn, ktp.; sed ĉio tio estas iom ekster la regosfero de la neŭtrala Esperanto-movado!

Tiel la instancoj, kiuj propagandas per Esperanto, kiel ankaŭ tiuj, kiuj tion malhelpas aŭ kiuj kontraŭpropagandas per la sama lingvo, vole-nevole rekonas la ekziston de esperantlingva publiko, kies apogon valoras varbi. Kaj tiaj instancoj plimultiĝas.

Al la radio-stacioj, kiuj interalie elsendas politikajn informojn, ĵus aliĝis Budapeŝto, kies ĉiutaga programo estas klare aŭdebla en granda parto de Eŭropo. Al la vicoj de politikaj gazetoj en Esperanto aliĝis antaŭ nelonge "Lanterno", ĵurnalaspekta eldonaĵo el Okcidenta Germanujo. La kajeroj "Por la paco", aperantaj en Moskvo, debutis en 1964. La antaŭan jaron komenciĝis la serio de broŝuroj de la Fremdlingva Eldonejo en Pekino, kies nombro jam superas tridek, por ne paroli pri la kreskanta verkaro de Maŭ zedong en Esperanto. Ĉio ĉi aldoniĝas al la eldonagado de Hanojo, la revuoj "El popola Ĉinio" (ekde 1950), "Paco" (1953), "Bulgario" (1957), "Okcidentgermana Revuo" kaj "Hungara Vivo" (1961), kaj radioelsendoj de Varsovio, Pekino, Sofio, Hilversum, Praha kaj aliaj kun politika tendenco.

Taŭgas tre bone por propagando


Jam en 1924 skribis Francesco Nitti, iama ministrara prezidanto itala: "Mi donas grandan signifon al la disvastigo de Esperanto... eĉ el vidpunkto politika. Dank' al sia facileco, ĝi taŭgas tre bone por la rapida disvastigo de la propagando..." Nature, do, ke ĝin aplikas tiucele ĉiam pli multaj instancoj.

La foje aŭdebla kritiko, ke "Esperanto estas — ista afero" (la radiko de "—ista" dependas de la lando) estas tre facile respondebla mallogikaĵo. En iuj ŝtatoj, tamen, ĝi servis aŭ servas nur por kaŝi kontraŭ-internaciisman politikon, ĉar, kiel diris J. B. Tito, "La ideo de Esperanto nature ĉiam havos malamikojn inter reakciuloj, precipe inter la ekstrema reakciularo."

Lingvo ne havas statuton. Esperanton, same kiel ĉiujn aliajn lingvojn, ĉiu rajtas libere uzi por ĉiuj celoj, inkluzive de politikaj.

V. S.

esperanto
marto 1966



Nuntempaj instruistoj ĉiam pli dubas pri la efikeco de tradiciaj metodoj de lingvo-instruado bazitaj sur tradukekzercoj. Novajn metodojn pioniris Andreo Cseh, kaj hodiaŭ la rektameta kurso estas firme establita en la Esperanto-movado. Poste la apero de instrumaŝinoj kaj aliaj helpiloj stimulis freŝajn esplorojn kaj eksperimentojn. Ĉi tie Andreo Pettyn, 27-jara instruisto de la pola lingvo kaj aŭtoro de pluraj lernolibroj kaj metodikaj studoj, priskribas siajn spertojn kaj originalajn instrumentojn.

LA INSTRUISTO FARIĜU REĜISORO

Andrzej Pettyn

Malbona komenco en la ŝakludo kondukas neeviteble al malvenko, malbona komenco en la instruado de Esperanto kondukas al la samo. Bona komenco signifas atingon de pozicio, kiu ebligas maksimuman utiligon de la fortoj ne-grandaj ĉe la komenco. Bona komenco havas grandegan signifon psikologian — ĝi donas energion kaj naskas entuziasmon por la Esperanto-movado.

Do, kiel devus aspekti tiu komenco? Kiel devus aspekti la tuta sistemo de la instruado de Esperanto vide al la bezonoj de la nuntempa vivo? Ŝajnas al mi, ke ĉi-koncerne ekzistas tiom da konceptoj kaj vidpunktoj, kiom da E-instruistoj. Gravas tamen la fakto, ke ĉiam pli multe da homoj en la esperantista medio (ekz. S. Szerdahely, A. Gauder, J. Toczyski), konscias pri la neceso enkonduki en la E-instruadon ŝanĝojn, kiujn ja delonge altrudas la vivo mem.

En kio devus konsisti la ekzercoj

Eldirante ion ajn en la gepatra lingvo ni ne kunmetas pene unuopajn vortojn kaj frazojn, kaj ni ne aplikas konscie la regulojn de la gramatiko zorgeme ellernitajn. Niajn eldirojn konsistigas eĥo de tiuj vortoj kaj frazoj, kiujn ni jam plurfoje aŭdis kaj multfoje eldiradis en similaj situacioj.

Tio ĉi kompreneble ne signifas, ke ni ĉiam eldiras tion, kion ni jam aŭdis iam — precize la samajn vortojn, en la sama sinsekvo. La nombro de eblaj vortkombinoj kaj frazokombinoj ja estas grandega, kaj ni ne povus kompreneble ellerni ĉiujn ĉi kombinojn parkere.

Parolante, ni ofte kreas kombinojn, kiuj estas por ni *novaj*, tio ĉi signifas tiaj, kiujn ni antaŭe neniam aŭdis aŭ eldiris. Tamen nia eldiro estas ĉiam konstruita *analoge* al la eldiroj, kiujn ni jam plurfoje aŭdis kaj mem ripetis.

Se iu ekzemple por la unua fojo en la vivo

eldiras la frazon:

"Mi ne havas aŭtomobilon",
sen longa cerbumado (kondiĉe, ke li konas la vortojn "skotero" kaj "libro") li povas eldiri la frazojn:

"Mi ne havas skoteron."

"Mi ne havas libron."

La profunda ekrego de la strukturo de tiuspecaj frazoj, de la strukturo, kiun la parolanto aŭdis kaj plurfoje ripetis en la vivo, permesas al li aŭtomate krei en la kadro de tiu ĉi strukturo nekalkuleblan nombron da novaj frazoj.

Por vere paroli Esperanton, oni ankaŭ devas ekregi profunde la bazajn strukturojn frazajn de tiu ĉi lingvo, tiel ke oni povu uzi ilin *aŭtomate*, tiel ke oni povu kreadi frazojn *analoge*, sen cerbumado. Por atingi ĉi tion oni devas en la komenca etapo *aŭskulti* kaj *ripeti*. La lecionojn de Esperanto, kiuj estas alkondukontaj nin sufiĉe rapide kaj efike al la scipovo paroli, ni komencu ankaŭ de *aŭskultado* kaj *ripetado*.

Ni ripetados la unuopajn frazojn tiel longe, ĝis ni ellernos ilin parkere. La parkerado tute ne estas senpripensa kaj papegeska, kiel al kelkiuj povas ŝajni, sed tio ĉi estas tre esenca elemento en la komenca stadio.

Kiam ni estos ekregintaj sufiĉe grandan nombron da pretaj frazoj, ni havos la bazon por eldiradi laŭ tiuj ĉi modeloj nelimigitan nombron da novaj frazoj. Ni faros ĉi tion aŭtomate, sen longa cerbumado, sen pena kunmetado de unuopaj vortoj, sen serĉado en la memoro por trovi la gramatikajn regulojn, kiujn oni devus apliki. Laŭ la ekkonado de novaj vortoj, ĉi tiujn novajn vortojn ni enmetados en la malnovajn kadrojn de la antaŭe ekkonitaj kaj alproprigitaj aŭtomate modeloj frazaj, transirante nerimarkite kaj preskaŭ senkonscie de la ripetado de la parkerataj frazoj al la libera formado de niaj propraj eldiroj, konsistantaj el kelkaj aŭ dek kelkaj frazoj kunligitaj laŭteme.

Plej bone estas parkerigi la lingvan materialon pere de mallongaj dialogoj. La apliko de la dialoga formo postulas tamen kreon de realecaj situacioj, prenita laŭeble el la vivo. Por la realecaj situacioj oni devas elekti taŭgajn motivojn, ekz. tiun de "deziro", kiu estas tre forta absolute ĉe ĉiuj homoj. La ŝanĝo de leksik- aŭ esprimelementoj en la koncerna frazmodelo, dum oni konservas senŝanĝe la gramatikan enhavon de la koncerna frazo kiel tuto (vortsinsekvo en la frazo, strukturaj vortoj, elementoj aglutinaj) estas la ĝusta, la racia lernado de la gramatiko de E-o laŭ la funkcia vidpunkto (tiusence plenkreskulo denaske parolanta la Internacian Lingvon konas la gramatikon de tiu ĉi lingvo malgraŭ tio, ke li povas ne koni la nomojn de ĝiaj unuopaj elementoj). La frazoj-modeloj devus esti tiel konstruitaj, ke oni praktike eliminu la eblon fari gramatikan eraron.

Tute speciale estas akcentinda la lasta frazo, ĉefe pro la fakto, ke inter la instruistaro daŭre cirkulas la opinio, ke oni devus "lerni per eraroj". Tiu ĉi opinio estas tute misa, kion motivigas ankaŭ psikologoj, dirante, ke — se la homo faras eraron — tiu ĉi eraro, eĉ se tuj korektita de la instruisto, gravuriĝas en la subkonscio de la homo kaj enestas tie sufiĉe firme. Ni do devus observi de la komenco la korektan uzon de la lingvo flanke de la lernantoj.

Kiel apliki la ekzercojn

a) Unuavice la instruisto skribas sur la tabulo la elektitan dialogon kaj la lernantoj transskribas ĝin, ekz.

A:2 estas10

B: Jes, efektive, li/ŝi estas10.

....2:	10:
sinjoro John Lennon	energia
sinjorino B. B.	ĵaluza
fraŭlino Lala	diskreta
	simpatia ktp.

b) La instruisto klarigas la signifon de la dialogenhavo kaj de la unuopaj substitueblaj elementoj inkluzive de la gramatikaĵoj koncer-naj; kelkaj kursanoj memstare formas frazojn, substituante ŝanĝelementojn kaj aldonante por amuzo nomojn de konataj aktoroj, sportistoj ktp.

c) Sekvas plurfoja ripetado de kelkaj eblaj variantoj de la dialogo (ĉiun frazon eldiras unue la kursgvidanto kaj poste la saman frazon ripetis laŭtvoĉe la kursanoj).

ĉ) Kiam la instruisto estas konvinkiginta pri la plena kompreno de la dialogenhavo flanke de la kursanoj, komenciĝas individuaj interparoloj cirklave laŭ la ĵus prezentita skemo. Ĉe tiaj interparoloj la plej bona dislokiĝo de la kursanoj estas duoncirkla, tiel ke la instruisto povu facile alpaŝi al la interparolantoj.

Por ke la interparoloj ne estu tro tedaj, oni devas variigi ilin: unue — per ŝanĝo de la interparolantaj paroj, due — per transformo de la dialogoj je diversspecaj ludoj.

Post la aŭtomata alproprigo de ĉ. 100-120 diversaj dialogoj, komenciĝas — paralele kun la daŭrigataj samtipaj dialogoj — pli liberaj konversacioj surbaze de la ellernita materialo.

Ekzemple:

Kiel vi pasigis la lastan sabaton (dimanĉon)?

Kie vi planas pasigi vian libertempon? (kun kiu?; kial ĝuste tie? ktp.)

Kion vi faris dum la nomtaga (naskiĝtaga) solenaĵo ĉe gesinjoroj Ajn? ktp., ktp.

La dialogoj ne celas forigi la lernolibron, sed ĉefe kompletigi ĝin; ili liveras al la kursgvidanto pretan konversacian materialon kaj tiele faciligas la instruadon; en la landoj, kie ne estas eldonataj lernolibroj de Esperanto, ili povas eĉ konsistigi la bazon de la instruado.

La prezentita sistemo de la konversacioj estas de kelkaj jaroj tre sukcese aplikata en Varsovio kaj — laŭ mia scio — en multaj aliaj urboj de Pollando. Observante la abiturientojn de ĉi-metodaj kursoj, kaj simplajn laboristojn, kaj alte edukitajn oficistojn, instruistojn ktp., oni povas rimarki, ke ili parolas *kuraĝe*, sufiĉe libere kaj *flue*, preskaŭ *tute korekte* (precipe admirinda estas la korekta uzo de la akuzativo kaj de la kunmetitaj tempoj), ili parolas *tre volonte*. Krome, la lecionoj gvidataj ĉi-metode kreas amikan, familieran atmosferon en la kurso kaj kaŭzas, ke malmultaj personoj for-lasas ĝin.

Tiel do, surbaze de multaj observoj, mi venis al la konvinko, ke la kursgvidanto devus rezigni pri la ofte renkontebla, sed superflua "aktorado", sed prefere li devus doni al la kursanoj scenaron, kiun — samkiel la aktoroj — ili parkeru laŭ la postuloj de la instruisto, kiu devus fariĝi reĝisoro kondukanta la kursanojn laŭ la scenarkadro de ili mem plenigata.

Kelkaj specimenoj de la menciitaj dialogoj:

A: *Mi intencas forveturi al1.*

B: *Kiam?*

A:6.

....1:

Parizo

Moskvo

Novjorko

Londono

....6:

hodiaŭ vespere

nokte

morgaŭ vespere

nokte

A: *Mi volus renkontiĝi kun vi, sinjor(in)o.*

B: *Kiam?*

A:6.

A: *Ĉu vi loĝas sola, sinjor(in)o?*

B: *Bedaŭrinde ne.*

A: *Kun kiu vi loĝas?*

B: (Provizore) kun2.

....2:

mia edzo mia frato mia amiko

edzino fratino amikino

A: *Kie troviĝas nun 2?*

B: *Li/ŝi estas5.*

....2:

via amiko

amikino

....5:

en kafejo

kinejo ktp., ktp.



1956

GRAJNOJ EN VENTO


1966

10-jara

"Ni semas kaj semas konstante" – la moto kaj simbolo de "Grajnoj en Vento" estas karakterizaj por ĝia persista, senbrua sed ege fruktodona laboro dum la pasintaj dek jaroj. Postulante nur minimumajn financajn rimedojn, la sistemo de lerneja interŝanĝo, kiun organizis Marcel Erbetta, aŭtoro de ĉi tiu artikolo, signifis por kelkaj miloj da infanoj en Esperanto-kursoj personan rilatiĝon kun malproksimaj landoj kaj realan valorigon de la Internacia Lingvo.

"En junio 1965, ni veturis al Maribor por partopreni kunvenon de kvar 'Grajnoj en Vento'-klasoj. Ni iomete timis, ĉar la unuan fojon ni veturis sen gepatroj al fremda lando, sed baldaŭ ni preskaŭ forgesis, ke ni estas en fremda lando. Kun dankemo, ni ofte pensas, *ke la vojaĝo estis granda evento de nia vivo.*" Tiel sin esprimas en GEV-kajero de aŭstra rondo 13-jara knabo Toni Hartner, el Graz, Aŭstrujo. En GEV-kajero de urugvaja rondo — nov. 1964 — la direktorino de "Escuela Experimental de Malvin" en Montevideo, sinjorino Margerita Queirolo skribas pri samspeca eksperimento: "Antaŭ unu jaro, oni realigis la 1-an Renkontiĝon por Internacia Interkompreno, surbaze de lerneja interŝanĝo: infanoj de Normala Lernejo 'Domingo de Oro' de Rafaela, Argentino, kaj infanoj de la Lernejo 'Experimental de Malvin' en Montevideo, Urugvajo. Tiam, dek geknaboj de la menciita argentina lernejo, kune kun du instruistinoj, vizitis Urugvajon kaj loĝis en hejmoj de infanoj samaĝaj kaj samseksaj, lernantoj de la lernejo 'Experimental de Malvin'. Tiel, ili kune partoprenis la hejman kaj lernejan vivon.

En septembro ĉi-jara, aliaj dek infanoj de la lernejo 'Experimental de Malvin' vojaĝis al Rafaela por, siafoje, kunvivi kun infanoj,



La porkino dormas...
la porkidoj mameŝas !

"En Kathmandu ni havas malgrandan belan lagon Rani Pokhari. Apud la lago estas granda ludejo Tunihel kaj alta Horloĝturo. Unu alia turo Dharahara estas alta tiel multe ke mi povas vidi la tutan urbon de tie." Tiel skribas por "Grajnoj en Vento" la 13-jara nepala knabo Umeŝ Kumar Devkota. Al infanoj ofte multe pli impresas la vortoj de alia infano ol formala geografia lernolibro.

"Pli ol cent porkidoj trinkis la lakton de sia patrino. Iuj havis nur 5 tagojn kaj ne sukcesis trovi la mamojn. Estis tre amuze !" Laŭ la desegnaĵo de 11-jara Marcel Wälti, Svislando, ni facile konsentas.

lernantoj de la lernejo 'Domingo de Oro'.

La amikecaj rilatoj establitaj per tiu ĉi interŝanĝo estis ne nur inter infanoj: tiuj rilatoj eliris al la nivelo de la plenaĝuloj, ĉefe inter la gepatroj. La lernejo tiel montris novan vojon por la interkompreniĝo inter la popoloj; la infanoj marŝas en tiu vojo, kaj la homoj de la mondo povas transformi ĝin en vojegon por sia neforigebla pacemo."

"Ni alvenis al Montevideo kontentaj, sed iom malĝojaj ankaŭ, forlasi tiujn geknabojn, la 'gepatrojn', kiuj tiel ĉarme akceptis nin. Por ni", skribis poste Ricardo Arcari, 11-jara lernanto el Montevideo, "ĝi estos tre bela memoraĵo, kiun ni neniam povos forgesi."

Tiaj entuziasmoplenaj deklaroj de infanoj estas tre valoraj por la subskribinto, iniciatinto de la lerneja entrepreno "Graĵnoj en Vento", ĉar ĝuste por helpi al tiu celo de amikeco inter tutmondaj infanoj estis proponita en 1956 la kreo de internaciaj interlernejaj rondoj.

"Graĵnoj en Vento" — oni legas en UEA-jarlibro 1965 — estas lerneja organizo superpolitika, superrasa, superreligia. La celo de GEV estas:

- krei reton de infanaj rondoj sur la tuta terglobo;
- pruvi la taŭgecon de Esperanto por interrilatoj de tutmondaj gelernantoj;
- helpi al klopodoj enkonduki Esperanton



Mezepokan samurajon pentris lerneĵano de la 6-a klaso en Kioto, Japanujo, por la svisa rondo de "Graĵnoj en Vento".

"Portreto de f-ino SEKI-Kimie", laŭ 9-jara UENO-Joŝie, ankaŭ el Kioto.



en la lernejojn;

- labori kun la infanoj por la internacia kunlaboro.

Dank'al GEV estas eblaj multspecaj kulturaj interŝanĝoj inter geknaboj: tekstoj, desegnaĵoj kaj pentraĵoj pri la reala vivo en la hejmo, lernejo, vilaĝo, urbo, lando. En la internaciaj klasgazetoj eldonitaj la infanoj rakontas pri folkloro, kutimoj, legendoj, ludoj, festoj, ĝojaj kaj malĝojaj okazintaĵoj. Ili parolas pri famaj homoj, kiuj eminente servis la Homaron, pri aspiroj de ĉiuj popoloj al feliĉo kaj paco. Per GEV, la gelernantoj interŝanĝas bildojn, fotojn, prospektojn, mapojn, poŝtmarkojn, sekigitajn florojn, monerojn, manlaborojn... unuvorte ĉion, kio povas servi al kulturo de la junuloj en aliaj partoj de la mondo.

De post 1956 ĝis fino de 1965, GEV eldonis 145 diversajn kajerojn (ĉiam je 25 ekzempleroj), en kiuj la infanoj *m e m*, laŭ sia propra infana stilo, laŭ siaj infanaj okuloj kaj konceptoj, priskribas sian vivon, la historion kaj geografion de sia lando. Tial, GEV-albumoj havas ĉe la infanoj pli da sukceso ol multekostaj geografilibroj verkitaj de plenkreskuloj, ĉar en la unuaj fluas la vivo mem, la simpla aŭtentika ĉiutaga vivo kun siaj ĝojoj kaj malfeliĉoj.


Alia avantaĝo de GEV estas, ke per unusola sendaĵo la partoprenantoj kompanse ricevas en formo de bindita albumo la verkojn de

Graĵnoj en Vento dekjara

deko da aliaj klasoj el tiom da landoj. Partoprenas en GEV klasoj kaj eksterlernejaj Esperanto-grupoj de infanoj — komence de 1966 50 klasoj el 21 landoj. Tiuj 50 klasoj apartenas al 4 "rondoj" aŭ grupoj, kies estroj estas: ges. Henriette kaj Pierre Fort, Fontaine-les-Grés, Francujo; Alberto Barrocas, Montevideo, Urugvajo; Josef Wesian, Graz, Aŭstrujo; Marcel Erbetta, Bienne-Biel, Svislando.

Tri-foje jare, la kunlaborantaj klasoj sendas siajn verkojn, en 25 ekzempleroj, al sia respektiva rondgvidanto, kiu tiam realigas 25 kajerojn eksterordinare valorajn, kun artaj pentraĵoj (originaloj), kaj spontanaj vivoplenaj rakontoj. Ĉiu klaso ricevas po unu ekzemplero. La kromaj kajeroj servas al disvastigo de la rondoj kaj por propagando de la afero "Esperanto en la lernejojn!"

Fakte, Graĵnoj en Vento estas pli *ligilo* inter diverslandaj klasoj ol gazeto. Pruvas tion, ke en la sino de ĉiu aparta rondo ekfunkcias baldaŭ privataj korespondinterŝanĝoj inter la infanoj mem kaj la instruistoj. En la rondoj kreiĝas iom post iom familia atmosfero. La



kulmino de tiaj interŝanĝoj estas kompreneble la reciprokaj tutklasaj vizitoj tiaj, kiaj okazis en 1963/1964 inter Montevideo kaj Rafaela, inter Graz, Maribor kaj Celje lastjare — ĉiuj klasoj estas kunlaborantoj de GEV.

Malforta flanko de GEV estas, ke ĝi senĉese devas barakti kontraŭ gravaj financaj zorgoj. Pro sia naturo mem, GEV havas preskaŭ nenian enspezojn, kaj aŭfrankoj kaj papero estas hodiaŭ multekostaj....

Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, la 50-klasa taĉmento de Graĵnoj en Vento senbrue kaj senŝanceliĝe daŭrigos la komencitan agadon, ĉar ĉiu en ĝi estas konvinkita, ke por amikeco, kulturo kaj paco, klopodo eĉ modesta estas utila. Pedagogoj, gvidantoj de junulgrupoj, GEV bezonas vian kunlaboron! Sendu vian aliĝon al


"GRAJNOJ EN VENTO"
rue de Pins 66,
2500 BIENNE-BIEL 7
Svislando
(poŝta konto 25-9485)

esperanto
marto 1966



La demonon desegnis 16-jara Saindhabi Ratna
Tuladhar, Kathmandu; la florojn Jarmila
Tomkova, 13-jara knabino el Ĉeĥoslovakio,
por la aŭstra rondo de "Graĵnoj en Vento".

La horloĝisto, evidente, estas sviso!



*Mia patro estas horloĝisto
René Perret
9-jara knabo*

Dum la pasinta monato, la monato tuj sekvinta la antaŭan limdaton por la kolektado, ne atingis la Centran Oficejon tre grandaj kvantoj da subskriboj. Sendube post la fino de la kampanjo de 1965 necesas iom da tempo por restartigi la motoron. Sed alvenis multaj petoj por novaj provizoj de subskribofolioj, kaj tiujn la C.O. tuj plenumis, presiginte jam novan kvanton de 30 000 folioj. Entute UEA jam presigis pli ol 240 000 foliojn.

Laŭ statistiko de la 2-a de februaro jam alvenis 696 094 individuaj subskriboj kaj 3307 kolektivaj (kun entute preskaŭ 58 milionoj da membroj). La distribuo laŭ landoj ne multe ŝanĝiĝis: laŭ absoluta kvanto ankoraŭ gvidas Japanujo, Bulgarujo kaj Jugoslavio.

Aldoniĝis al la listo pluraj landoj, de kiuj antaŭe ne venis subskriboj: Ĉilio, Ebura Bordo, Ekvadoro, Etiopio, Portoriko kaj Sanmarino. Notinde kreskis la kolektado en Turkujo, kie oni presigis la tutan subskribo-folion kun turka teksto de la Propono kaj kun turklingvaj instrukcioj por ebligi kolektadon ankaŭ fare de ne-esperantistoj. Tiun metodon ankoraŭ povus imiti kelkaj aliaj landoj.

Du ŝtatestroj respondas

Interese estas kompari la respondojn de la germana kanceliero Ludwig Erhard kaj la brita ĉefministro Harold Wilson. Ambaŭ ricevis inviton subskribi la Proponon. Kvankam prof. Erhard rifuzis pro politikaj kaŭzoj, li esprimis grandan interesigon por la iniciato de UEA kaj deziris tre bonan sukceson al la kampanjo kaj pozitivan akcepton ĉe Unuiĝintaj Nacioj. S-ro Wilson, aliflanke, esprimis la opinion, ke pli grava obstaklo al internacia kunlaboro, ol la lingva diverseco, estas la diferencoj inter evoluantaj kaj evoluantaj landoj, kaj ke ne-

cesus dediĉi la rimedojn de Unuiĝintaj Nacioj unuavice al la evoluantaj landoj.


Kiel ni jam pli frue raportis, alian opinion havas la ĉefministroj dana kaj islanda kaj la prezidanto de Aŭstrujo. Al ilia pozitiva vidpunkto pri la Propono aliĝis nun jenaj subskribintoj: Victor Leemans, prezidanto de la Eŭropa Parlamento; G. Klerides, prezidanto de la kipra parlamento; prof. C. C. Berg, estrarano de la nederlanda nacia komisiono por Unesko, vicprez. de la Internacia Konsilantaro de Filozofio kaj Sociaj Sciencoj; d-ro Marcel Mollion, membro de la franca nacia komisiono por Unesko, prezidanto de la Arta kaj Intelektita Unuiĝo de Francaj Fervojistoj; Oskar Nikula, rektoro de la universitato de Turku, Finnlando; Edmund Blunden, konata angla poeto; kaj la episkopoj de Lapua, Finnlando; Ambato, Ekvadoro; kaj Rimini, Italujo.

En Brazilo subskribis grava eduka organizaĵo "Nacia Kampanjo de Senpagaj Lernejoj" (150 000 membroj).

Kiom da miluloj ?

Milionuloj, bedaŭrinde, maloftas en la Esperanto-movado; tamen da miluloj ni povas nomi almenaŭ 15 — nome personoj, kiuj jam kolektis almenaŭ mil individuajn subskribojn. Al iliaj vicoj aliĝis s-roj Nikola Mladenov (pli ol 3000) kaj Lazar Mladenov (pli ol 2000) en Bulgarujo. Aliaj jam notitaj estas s-roj G. kaj N. Mihajlovi, P. Petrov, L. Molnár, I. Stankó, A. Wágner, K. Friedl, J. M. Nagy, S. Čáp, A. Masuhr, P. Amorim Cardoso, M. Müller, kaj s-ino Vera Kirilova.

Volonte ni publikigos la nomojn de aliaj miluloj, se tiaj ekzistas, kaj se ili bonvolos atentigi pri la nombro de individuaj subskriboj, kiujn ili mem kolektis.



Jam impone impresas la
amasigitaj subskribo-
folioj de la Propono
al Unuiĝintaj Nacioj.
Sed la celo estas,
kreskigi la kvanton
per almenaŭ 50% ĝis
la 31-a de julio,
la fina limdato.
Ĉu vi kunhelpas?





*Supre: Riegersburg
Dekstre: Lur-groto (la "orgeno")*

URBO DE LA DUA INTERNACIA KONFE- RENCO DE LERNEJOJ (En kiuj Esperanto estas instruata)

La ĝardenurbo Graz situas ĉe la renkontejo inter nordo kaj sudo. Pro la ŝirmita situo ĝi havas mildan klimaton. Tial la printempo alvenas ĉi tie relative frue. Do ne estas miraklo, ke Graz fariĝis la "urbo de la pensiuloj", kiuj ĉi tie povas pasigi sian vivovesperon en plej agrablaj cirkonstancoj. Graz ja prezentas ĉiujn avantaĝojn de granda urbo kaj la agrablaĵojn de kampara vivo.

.... Kaj ferii — libertempi — en la "verda" Stirio estas revo — pri belegaj sunplenaj tagoj en lando kun altaj, neĝkovritaj montoj, kun bluaj lagoj, verdaj arbaroj kaj ete deklivaj montetoj. Jes, vi revas pri ideala feria lando, vi revas pri la benita Stirio, kies pejzaĝa beleco jam ofte donis ravan fonon por romanoj kaj rakontoj de famaj aŭtoroj.

Ne senkaŭze oni nomas Stirion la "varioplena lando". Ĝi ja prezentas al la feria gasto ĉion, kion ajn li povas deziri. Antaŭ ties mirantaj okuloj altiĝas majesta montegaro kun abruptaj rokmuroj, sur kiuj grimpemaj montamikoj povas elprovi siajn kapablojn. Sed ekzistas ankaŭ montsuproj kun belega rondrigardo, kiuj


2a Int. Lerneja Konferenco Graz 1966

Adreso: A - 8046, Graz-St. Veit, Aŭstrujo.

Informoj de la LKK koncerne la ekskursojn: Por ke ni povu fari ĝustatempe la necesajn aranĝojn, ni petas la aliĝintojn, kiuj deziras partopreni dumkonferencan ekskurson, elekti inter la jene indikitaj celoj: Lurgroto, alpoĝardeno Ranaĥ, Riegersburg, Deutschlandsberg. Anoncu vian celon al la LKK!

Gravaj informoj de la LKK pri la pago de l'kotizo: Por ŝpari al vi ĉagrenon ni petas vin, pagu simple per iu banko al **Steerm. Sparkasse Graz, Schmiedgasse**, por **Esperanto-Konferenco Graz k-to 5431**.

Familianoj kaj gejunuloj (gestudentoj) pagas la duonan kotizon. Infanoj estas liberaj de kotizo.





Grundl-lago

estas senpene atingeblaj per seĝoliftoj aŭ kablovagonoj. En tiu lando oni povas migradi malproksimen tra alpaj herbejoj, kie eksonas melodie la sonoriloj de paŝtigantaj bovoj. Kaj multkolora montfloraro entuziasmigas la rigardanton. En kelkaj alpoĝardenoj tiaj floroj trovas hejmojn por protekto kontraŭ ekstermiĝo. La alpoĝardeno Rannach troviĝas apud Graz. Aŭtobusoj helpas al la turisto eviti lacigan marŝadon.

Kvin km. tra la monto

Misteraj malhelaj arbaroj ĉirkaŭas en la norda parto de la lando revigajn lagojn, en la sudo maturiĝas delikata vino sur sunplenaj montetoj kaj deklivoj. Subtera fabela mondo malkovras sin al la vizitanto en grotoj kaj kavernoj, el kiuj la plej grava mirindaĵo estas la Lurgroto ĉe Peggau, 20 km norde de la Graz-a centro. Tra du kontraŭaj enirejoj en tiun akvoaktivan kavernegon vi iras sur 5 km longa komforta kaj sekura betonvojo preter per stalaktitoj kaj stalagmitoj ornamitaj haloj kaj profundaj abismoj tra la monto. Laŭdezire

okazas unu-, du- kaj trihora gvidadoj tra tiu fabela subtera mondo, ĉe kies ambaŭ enirejoj atendas vin bonege mastrumataj gastejoj.

Alia specialaĵo estas la kastelo Riegersburg en Orientstirio. Sur kruta basaltrokego ĝi etendiĝas larĝe kun siaj bastionoj kaj pordegoj. En la fortikaĵo, en la mezepoko la plej potenca de l'kristana mondo, vi trovas muzeon de antikvaj armiloj kaj diversaj artaĵoj. Teatro-ludoj zorgas ankaŭ dum la somero por la kulturaj bezonoj de l'gastoj el la feriejo ĉirkaŭ la kastelo.

Alia tre vizitinda loko estas ĉe la piedo de l'Koralpo (2141 m) la idilie situanta urbo Deutschlandsberg. Ĝin superas la kastelo Landsberg kaj ĉirkaŭas vitejoj kaj maronarbaretoj.

Ĉe la fino ni ankoraŭ povas sciigi al vi, ke vi renkontos ĉilande afablan, gajan popolon, kiu konservadis nefalsita sian tradicion kostumon kaj multe da malnovaj moroj. En ĝia mezo vi certe sentos agrable kaj volonte vi revenos por daŭrigi vian ferian revon — en la bela "verda Stirio".

K. Friedl / Jos. Eder

esperanto
marto 1966

LASTA PAŜO

Per tiu ĉi verketo la aŭtoro gajnis la trian premion en la branĉo originala prozo de la belartaj konkursoj 1965 en Tokio. Liaj antaŭaj sukcesoj estis, en la sama branĉo, dua premio en 1964 (la rakonto "Nur hundo", kiun deklamis en Hago Roger Bernard) kaj tria premio en 1963 ("Mesaĝo de la hejmo" – vidu en Monda Kulturo 1964, p. 180). La aŭtoron aparte karakterizas konstanta strebo al stila perfekteco. Li loĝas en Agostyán, Hungarujo.

Glacia vento fajfe muĝas, akraj dornoj de frostigaj neĝeroj la haŭton pikas. Ĉie nur nebulo, mallumo, kaj mortiga frosto. La firmamento estas nubokovrita, la tero neĝe morta. Li ŝvite sin trenas antaŭen, al nevidata celo, kontraŭ nevenkebla ventoblovo. Ĉu la direkto estas ĝusta?... Li jam ne scias. Ĉu la vojo estas konata?... Li jam ne memoras. Ĉu la celo estas proksima?... Li jam ne esperas. Li trene sin ŝovas, pene baraktas. La frosta ŝvito en gutoj fluetas sur lia dorso, kaj tuj glaciĝas. La hieraŭo estas jam forgesita, la morgaŭo dronas en mallumo, nur la nuno vivas kaj baraktas en liaj suferaj fortostreĉoj.

Li trenas kaj trenas sin sangoŝvite tra senvojaj vojoj, tra kampoj kaj valoj, neĝplenaj montodorsoj. La cerbo jam freneze muĝas, la dentoj timtreme klakas. La vidon ruĝa nebulo malklarigas, la aŭdon forta sangotamburado forrabas. La terura barakto daŭre daŭras.

Li jam ne konscias plu la celon de sia iro, li jam ne scias plu la sencon de sia ekzisto. Nur tiu ĉi pena barakto, tiu ĉi spasma irvolo en li pulsas, kroĉe lin tiras al nekonata celo.

Novaj kaj novaj ventokirloj la frostigan neĝamason blove levas, la malsekan nebulmason ŝire miksas. Lumo nenie.

☆

Apud la lito, du virinoj flustre interparolis.

— ... Ne, panjo! Nigran ŝalon mi ne surprenos, eĉ por la entombiga ceremonio. Al mia haŭtkoloro ĝi ne konvenas. Prefere ian malhele bluan. Ĝi same decas al funebro.

— Faru, kiel vi volas. Mi nur atentigas vin, ke la blua ne kunharmonius kun viaj okuloj. Miaparte, mi veŝtos min plej simple, ĉar en tiu ĉi provinca urbo la homoj estas tro puritanaj. Nu, kaj se li volas esti entombigita ĝuste ĉi tie, ni devas obei la lokajn kutimojn. Ja vi scias, ankaŭ liaj amikoj ĉeestos.

La palpebroj de la mortanto ekmoviĝis. La flustrado ĉesis. La edzino atente aŭskultis la ĝemstertoran spiradon. Ŝi mansigne silentigis la filinon.

☆

La nebulo ĉiam plidensiĝas. La mallumo ĉiam plinigriĝas. Li jam nur sentas la ventoskuon en ĉiuj siaj poroj, sed la muĝon de la ventego liaj oreloj ne plu perceptas. La lastaj fortostreĉoj liajn membrojn antaŭenmovas. Li volus jam por helpo krei, sed la forto mankas. Li

volus ekvidi celon, esperigan lumon, sed jam la okuloj blindas. Li volus apogon senti, per la manoj manon kapti, sed jam la manoj sensente pendas. Nur la piedoj ankoraŭ trene baraktas kontraŭ la neevitebla fato.

Sola li baraktas en la prema nokto, en la mortiga frosto, kontraŭ nevenkeblaj naturfortoj.

☆

— Nu, kaj mi scivolas, kiel envere li testamentis? Ĉu tiu malnova amiko ne multe forrabos de ni? Ja en la lastaj monatoj multe li parolis pri tiu amikeco. Estus honte, se ĝin li antaŭmetis al la deviga apogo de vidvino kaj orfino.

— Sed panjo kara!... Ja tamen ne decas...

— Ĉu decas aŭ ne decas... ja baldaŭ vi edziniĝos, monon ni bezonas... Monon, monon, multon da mono...

La mortanto sin ekmovis, lia supra korpoparto streĉe leviĝis, la okuloj pene malfermiĝis.

La lastaj vortoj de la edzino jam atingis lian nebulan konscion, sed li ne kapablis ilin ĝuste percepti. La neĝblovado ankoraŭ kirle furiozis en lia cerbo.

Liaj lipoj trene ekbalbutis.

— La mono... Jes... la mono. Jes ja... ĝi estas vantaĵo. Kiom nun ĝi min helpus, se ne ĉirkaŭsidus min vi, miaj amatoj... Tiu ĉi terura neĝblovado, kiun febrosonge mi ĵus travivis... Sed mi sentas, ke baldaŭ... denove... denove mi devos komenci la vagadon... sen reveno... sola... jam ĉiam nur sola...

Lace li eksilentis.

La edzino proteste karestuŝis lian kapon.

— Ho ne, vi resaniĝos kaj vivos ankoraŭ longe kun ni... Trankviliĝu... La... la testamenton... kie la testamenton ni trovos?...

— La... la testamenton?...

Li denove eksentas la froston de la neĝblovado. Li perdas la konscion kaj ree trovas sin meze de la glacikovritaj, morte frostigaj kampoj... sola... tute sola... La ventego kirle furiozas kaj li batalas sola kontraŭ la necedema sorto.

La fortoj lin ĉiam pli forlasas. Jam apenaŭ li povas stari. Antaŭeniri li tute ne kapablas. Kaj kial do?... kien do?... La vojo finiĝis. Eĉ en subkonscia febrosongo li sentas tion klare. Li staras tute sola en la mezo de la

neĝa kirl-amaso, en mezo de glacia frosto. Li, la sola ankoraŭ ekzistanta vivaĵo en la mondo. Ĉirkaŭ li: nur frostiga fremdo, senesperiga indiferento. La mondo vivas nur en lia animo... ankoraŭ ĝi vivas tie... Sed baldaŭ: nenio. Nur unu paŝo mankas, nure unusola paŝo. Kaj tiun ĉi lastan paŝon li sola devas fari. Neniu lin povas akompani, nek helpi. Li jam elpaŝis el la cirklo de la vivantoj, el la cirko de homaj pasioj. Sed li ankoraŭ ne transpaŝis en la regnon de la eterna trankvilo. Kaj subite li ekdeziras tiun trankvilon. La animo morne malplena, la korpo elĉerpiĝinte laca, kaj li jam scias, ke la vivo apartenas al la vivantoj, lia apartenaĵo estas nur la eterna mallumo.

...La testamento... Ja tion li ne faris. Ne gravas. Nenio gravas. Nur la trankvilo, la forgeso gravas. La forgeso pri ĉio; pri la vivo, pri la morto.

Sola li restis. Sola ĉe la limo de vivo kaj morto. Kaj nun: tiun ĉi lastan paŝon...

La ventego ankoraŭfoje ekfuriozas. La neĝ-amaso kirle levigās.

Li ankoraŭfoje streĉas siajn fortojn. La manon li eklevas, kvazaŭ adiaŭ-geste... Adiaŭ... Sed, al kiu?... Neniu lin jam revoke atendas. Decidajn paŝojn la homo devas ĉiam sola fari, sola travivi. Kaj la mano, levita por adiaŭo, rezigne subenfalas.

Li paŝas antaŭen. La neĝamaso ĉion ekkovras. Terura siblomuĝego. Poste silento, mallumo.

☆

La homo kuŝas en la lito jam senmove. Liaj okuloj estas malfermitaj, kvazaŭ rigardantaj ien foren, al nekonata, malklara brileto de malproksima, fremda planedo.

La spirado jam ĉesis.

La lasta paŝo farita.

☆

La du virinoj ekstaras. Ili alrigardas la kadavron, sed ĝin tuŝi ne kuraĝas. La okuloj de la mortinto restas malfermitaj.

Larmogutoj aperas en la okuloj de la vidvino. Mallaŭte, dolorplene ŝi ekparolas:

— Tuj mi sciigos la kudristinon, ke ŝi estu ĝustatempe preta.

NEKROLOGOJ

PIERRE BOVET (1878-1965)

La 2-an de decembro mortis Pierre Bovet, svisa edukisto monde konata, kunfondinto de la Instituto Jean-Jacques Rousseau, honora profesoro de la Universitato de Ĝenevo. Li estis delonga membro de UEA.

IDA CHRISTENSEN

La 29-an de januaro mortis Ida Christensen, konata gvidantino de internaciaj kursoj en Helsingør kaj Vejle, Danlando. Krome ŝi sisteme redaktis la organon de CDEL kaj verkis sub pseŭdonomo Adi la libron "La forto de l' vero", kiu jam atingis sian trian eldonon. Si estis 80-jara.

PRI LA ORIGINALA LITERATURO

En sia bona artikolo pri la originala Esperanta literaturo aperinta dum la lasta dekjarro s-ro Auld ree tuŝas la ioman mankon de ampleksaj prozaĵoj, kiuj evidente estas malabundaj, se oni rigardas la riĉajn poemkolektojn, kiuj eliris dum tiu sama tempo. La kaŭzojn de tiu malekvilibro ni ne volas analizi ĉi tie. Tamen estas konstateble, ke el niaj poetoj nur tre malmultaj ankaŭ same fruktoporte laboris sur la kampo de romanverkado. Kaj se ni foje ricevos romanon havantan la samajn kvalitojn, kiajn havas ekz. la kaloĉaja poezio, ni efektive ankaŭ sur tiu literatura kampo havos ion, pro kio ni plu ne bezonos honti.

Aliflanke estas mirige, ke s-ro Auld per neniu vorto mencias unu originalan romanon (se difini romanon per 'prozaĵo ampleksanta pli ol 100 presitajn paĝojn', kiel li faris en Monda Kulturo, n-ro 3), kiu aperis ĝuste en la priparolata de li tempo, nome: Stevan Živanović: La sonorilo de Bled, Beograd, 1959. (La romano estis verkita jam 20 jarojn antaŭ la eldonado.) Kvankam la roluloj en ĝi ankaŭ estas esperantistoj (eble en tio sentiĝas ia transheredigita tradicio, kiu floris jam en Idoj de Orfeo, Stranga Heredaĵo kaj en Paulo Paal), tio tamen nur rimarkiĝas per delikataj aludoj kaj neniom deprenas la efektivan valoron, kiun la romano havas. Ĝi efektive meritis esti iom malpli orfe traktata. Ĝi certe (por resti ĉe la Auld-aj kategorioj) nombriĝas inter la asfodelojn de nia literaturo.

Reinhard Haupenthal
Sulzbach, Germanujo, 18 jan 66

"Kiel *Esperanta antologio* ĝi" (nome 33 rakontoj) "havas la malfortojn de ĉiaj antologioj (ĉefe, ke ĝi devas esti tro minimuma)." — W. Auld: la originala Esperanta literaturo 1955-65.

Do "Esperanta antologio" kaj "33 rakontoj" enhavus tro malmultajn poemojn resp. rakontojn! Miaopinio ili kulpas ĝuste la malan eraron: ili enhavas tro multajn pecojn kaj tial ankaŭ multajn malgravajn. Por "33 rakontoj" tion argumentis jam C. Piron en Monda Kulturo (somero kaj aŭtuno 1965). Koncerne "Esperantan Antologion" nur legu la kritikon de Auld mem en la enkonduko je la poetoj el la unua periodo.

W. A. Verloren-van-Themaat
Amsterdam, 14 jan 66

INFORMBROŝUROJ KAJ -KARTOJ

En via ĉefartikolo en la februara "Esperanto" vi diras: "Distribuante kun informa broŝuro respondo-karton, kiel tion faris GEA kaj BEA, oni povas ricevi konkretan bildon pri ĝia efiko." Fakte, oni ne distribuas karton kun broŝuro. Oni disdonas kartojn al esperataj interesebluloj diversmaniere, ekz. person-al-persone. La relative multekostan broŝuron oni sendas nur al personoj sufiĉe interesitaj, ke ili instiĝis aĉeti poŝtmarkon kaj resendi la karton al la nacia asocio.

C. M. Houghton
Londono, 10 feb 66

esperanto
marto 1966

OPINIOJ PRI ESPERANTO KAJ LA LINGVA PROBLEMO

Informante pri la Internacia Lingvo, oni ofte trovas oportuna citi opinion de eminenta verkisto, politikisto aŭ simila pri Esperanto aŭ pri la lingva problemo. Sed de kiu fonto ĉerpi tiajn citaĵojn? Kie trovi la originalajn dokumentojn aŭ fidindajn tradukojn? Povas okazi, ke oni trovas en diversaj eldonaĵoj malsamajn tekstojn de evidente sama citaĵo. Kiel kontroli, kiu el ili estas preferinda?

Laŭ unu traduko el la verko "Via lucis" (1641), ekzemple, la ĉeĥa filozofo Jan Amos Komensky skribis:

"Ni opinias, ke unu komuna lingvo estas por la mondo bezonata, kaj se alia ne ekzistus, pli konvenus por tiu ĉi bezono destini la latinan ol kiun ajn alian. Sed ĉar niaj pensoj nun pli alten direktiĝas, ni ne povas ne konsili pli volonte lingvon tute novan, lingvon pli facilan ol ĉiuj konataj, kiun oni povus lerni sen perdo de tempo kaj aferoj."

Sed en "Esperanto" 1934, p. 25, oni legas:

"Restas do nenio alia, ol krei lingvon novan, superantan ĉiujn lingvojn jam konatajn 1. per facileco, por ke oni povu ĝin lerni sen perdo de tempo kaj de aferoj, 2. per dolĉeco, por ke estu ĝuo ĝin lerni kaj ellerni, 3. per perfekteco, por ke ĝia posedo tre utilu ol aferoj mem."

Kiu liveros kompletan kaj definitivan tradukon?


Kion skribis Romain Rolland?

La ĉi-jara 100-a datreveno de la naskiĝo de Romain Rolland, eminenta franca aŭtoro kaj militkontraŭulo, aktualigas lian ofte esprimitan apogon al Esperanto. Facile estas, en artikoloj pri Rolland por ne-esperantaj gazetoj enplekti aludojn al lia interesiĝo pri komuna lingvo. Multajn informojn oni trovas, ekzemple, en la rememoroj de lia amiko Edmond Privat, "Aventuroj de pioniro" (Stafeto 1963). Estis Privat, kiu prezentis la francan verkiston al Hector Hodler, la fondinto de UEA.

Same oni povas reagi al jam aperintaj artikoloj pri Rolland per leteroj, en kiuj oni emfazas la gravecon de lia apogo al la afero de internacia lingvo — apogo, kiun partoprenis ankaŭ la multjara (1917-1936) korespondamiko de Rolland, Maksim Gorkij.

Sed kie trovi la pruvajn tekstojn pri tiu apogo? Unu tia aperis en la broŝuro "Al la forbuĉataj popoloj" (UEA, 1920), laŭ kiu Romain Rolland skribis al la tradukinto:

"La disvastiĝo de Esperanto sendube ne sufiĉos, por subpremi inter la homoj la malkonsentojn kaj la kaŭzojn de la malpaciĝoj,



Romain Rolland (1866-1944)

ĉar en ĉiu lando, parolanta komunan lingvon, regas ja hodiaŭ kruela malkonkordo; sed Esperanto faros elekton inter la spiritoj en la tuta mondo, ĝi kungrupigos la pensfratulojn, dissemantajn sur la terglobo kaj disigitajn unuj de la aliaj per la baroj de la lingvoj naciaj."

Imitinde, la tradukinto (Georg Mahn) aldonis en piednoto la originalan franclingvan tekston de la letero. Sed en aliaj kazoj regas konfuzo pri la ĝusta teksto. Laŭ pollingva verko Romain Rolland iam skribis:

"Por ke la popoloj povu interkonsenti, ili devas antaŭ ĉio interkompreniĝi... Esperanto redonas aŭdkapablon al tiuj surduloj, kiuj dum tutaj jarcentoj restis en la malliberejaj limoj de siaj naciaj lingvoj."

Dume, laŭ franclingva cito, li skribis:

"Por ke la popoloj interkompreniĝu, necesas unue, ke ili aŭdu. Esperanto redonu la aŭdkapablon al tiuj surduloj, el kiuj ĉiu jam de jarcentoj estas enmurigita en sia lingvo."

Kie aperis la originala, kompleta teksto, kaj kiu prezentos definitivan tradukon en Esperanto?

Dokumenta laboro komencita

Por eviti misprezentojn kaj erarojn urĝe necesas kompili kaj publikigi kiel eble plej kompletan kolekton de citaĵoj de gravaj personoj, kiel Komensky kaj Romain Rolland, kun fidindaj Esperantaj tradukoj, precizaj indikoj pri la aperloko de la originala teksto, kaj, eventuale, kun aldono de tiu originalo mem. Feliĉe, tiun gravan laboron jam komencis mag. Isaj Dratwer (Eŝel 86/15, Bat-Jam, Ramat Josef, Israelo). Li kompilis pli-ol-50-paĝan manus-

kripton kun opinioj de pli ol 80 eminentuloj diversepokaj.

Ĉiuj, kiuj povas kontribui aldonojn, precizigojn, referencojn, fidelajn tradukojn aŭ kiun ajn alian helpan informon, bonvolu kontakti kun mag. Dratwer ĉe la indikita adreso.

U.E.A. KANDIDATO POR LA NOBEL-PACPREMIO 1966

Laŭ la informo ricevita el Svedujo entute 34 membroj de la Sveda Parlamento denove kandidatigis UEA al la Nobel-Pacpremio. La proponintoj apartenas al diversaj partioj: socialdemokrata, centra, popola kaj komunista. Tre verŝajne ankaŭ el aliaj landoj diversaj kvalifikitaj personoj, kiuj komprenas la gravecon de la laboro de Universala Esperanto-Asocio por la monda paco, kandidatigis U.E.A. por la Pacpremio en 1966.

CED/7 EN LA JAPANA, FRANCA KAJ NEDERLANDA

Kiel anoncote pli frue, la dokumento de CED "Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo" aperis unue en la Esperanta originalo kaj poste en la angla, hispana kaj pola tradukoj. Nun estas presita la japana eldono; la eldonoj franca kaj nederlanda aperos baldaŭ. CED ripetas sian sugeston rilate la utilecon publikigi tiun dokumenton ankaŭ en aliaj naciaj lingvoj. La landaj asocioj, resp. iliaj informaj fakoj, bv. pripensi tiun eblecon.

U.E.A. EN PUBLIKAĴOJ DE UNESKO KAJ U.I.A.

En "Unesco Chronicle" de oktobro 1965, p. 397, aperis informo pri la intenco de UEA prezenti al la Sekretariato de U.N. la konatan Proponon. En la informo estis dirite, ke la Proponon subtenas 944 organizaĵoj kun entute 16 milionoj da membroj; krome 185.000 individuaj personoj el 48 landoj. Intertempe la nombroj konsiderinde kreskis. Laŭ la stato fine de januaro 1966 la Proponon subskribis entute 696 094 personoj kaj ĝin apogas 3307 organizaĵoj kun entute 57 887 000 membroj. Estas tute certe, ke tiuj ciferoj ankoraŭ kreskos ĝis la 31-a de julio, la lasta limdato por kolektado de la subskriboj.

En la periodaĵo de UNESKO "Orient-Occident", n-ro 5 de oktobro 1965, p. 13, denove troviĝas informo pri la serio de U.E.A. "Orient-Okcidento". Krome estas menciitaj ankaŭ "La Libro de Teo" de Kakuzo Okakura kaj "Enciklopedieto Japana" de T. Nakamura.

Entute ĝis nun CED registris pli ol 100 informojn pri Esperanto aŭ U.E.A. en la dokumentoj aŭ periodaĵoj de UNESKO.

Ankaŭ en la Jarlibro kaj periodaĵoj de la Unio de Internaciaj Asocioj regule aperas informoj pri U.E.A. kaj pri aliaj Esperanto-

organizaĵoj. En "International Associations" n-ro 11 de novembro 1965, pp. 654-655, sub la titolo "Aktiva Somero por Esperanto", estas publikigita unupaĝa informo pri la kongreso en Tokio kaj pri diversaj aliaj internaciaj Esperanto-aranĝoj en 1965.

HISTORIO DE ESPERANTO-MOVADO EN JUGOSLAVIO

La kunlaboranto de CED, s-ro M. Gjivoje, antaŭnelonge verkis detalan historion de la Esperanto-Movado en Jugoslavio kaj publikigis ĝin en daŭrigejoj en "Jugoslavia Fervojisto". Nun la verko aperis libroforme. Ĝi prezentas dokumentitajn detalojn pri la Esperanto-Movado en tiu lando ekde unuaj komenciĝoj en 1904 ĝis la nuntempo. La libro estas ilustrita per reproduktaĵoj de 131 fotoj kaj havas 152 piednotojn. Ĝi estas valora kontribuo ne nur al la historio de la Esperanto-Movado en Jugoslavio, sed ankaŭ al la tutmonda. Estus tre utile, se ĉiu landa asocio prizorgus similan verkon pri la historio de la Esperanto-Movado en sia respektiva lando.

LA UNIVERSALA EKSPOZICIO

La Universala Ekspozicio de Esperanto, kiun CED kreis antaŭ dek unu jaroj okaze de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo, ricevis sian sepan elmontron en Oslo en septembro (6 ĝis 13), laŭ aranĝo de la Klubo Esperantista en Oslo. Mil informbroŝuroj estis disdonitaj, 250 vizitantoj subskribis la Proponon al U.N., multaj lernolibroj vendiĝis kaj 25 personoj aliĝis al novaj kursoj.

Donacoj al CED

En la rubriko de CED, publikigita en la aprila numero de "Esperanto", p. 70, la donaco de s-ro R. Slot, Nederlando estis anoncita en la sumo de £1-10-0. Fakte, tamen, la donaco estis £2-10-0, kiel konstatite dum la kunmeto de la jara finkalkulo, sed pro tajperaro ĝi aperis kiel £1-10-0. Sekve, la stato je la 31-a de oktobro 1965 ne estis £101-13-1, sed £102-13-1.

	£	ŝ	p
La stato je la 31-a de oktobro 1965	102	13	1
F-ino A. Solar, Britujo	2	10	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5	0	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5	0	0
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	1	0	0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10	5	
S-ino M. Mention, Belgujo	18	6	
Ges-roj G. Debrouwere, G. Iserentant, G. Maertens, F. Roose, J. Terriijn, ĉiuj Belgujo	3	12	6
F-ino A. Laverman, Nederlando	1	5	0
D-ro A. Maillard, Francujo	11	0	

La stato je la 31-a de decembro 1965.. £ 123- 0-6

Tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Donacojn por CED akceptas la C.O. de U.E.A., ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

GRANDA VORTARO POR ISLANDANOJ

Islanda-Esperanta vortaro, de Baldvin B. Skaftfell. Eld. Federacio de Islandaj E-istoj, Rejkjaviko, 1965. 479 p. 21 x 14 cm., bind.

Estas agrabla tasko recenzi la suprenomitan vortaron. Tute malgranda nacio (ne pli ol 200 miloj da islandanoj) ricevis tiel grandan kaj bonan vortaron, pri kia povus esti reprezentantoj de multaj aliaj nacioj, inter ili de tre grandaj.

La aŭtoro estas Baldvin B. Skaftfell, unu el la plej lertaj islandaj esperantistoj, kiu uzis multajn jarojn por peniga kompilo de la vortaro. Kaj al li helpis per sia redakta laboro filologia magistro Árni Böðvarsson, unu el la plej aŭtoritataj fakuloj pri islanda lingvo.

La vortaro enhavas 20-25 000 islandajn vortojn, tradukitajn esperanten. Inter ili ofte estas tre specialaj, do malfacile tradukeblaj de ordinarnaraj lingvouzantoj. Esperanto-tradukoj estas

abundaj (ekz., *laga* okupas preskaŭ tutan kolumnon), kio ebligas al la uzanto elekti la plej taŭgan. La aŭtoro ne trouzas sian rekomendrajton de vortaristo, kaj uzas ofte konkurantajn formojn samtempe, ekz. *strando* kaj *plaĝo*.

Uzado de la vortaro postulas de nova esperantisto specialan atenton al gramatika signifo de koncernaj vortoj, ĉar ne ĉiam islanda vorto estas tradukita esperanten per la sama vortklaso; ekz., islanda vorto *skafa* estas tradukita nur per verbo, kvankam ĝi havas ankaŭ substantivan sencon.

Islandaj vortoj en la vortaro estas provizitaj per iuj gramatikaj notoj, ekz., ĉe substantivoj ili montras genron, genitivon sing. kaj nominativon plur. Do ĝi povas esti ankaŭ uzata de esperantistoj por studo de islanda lingvo.

Ni povas gratuli niajn islandajn amikojn pri apero de tiel valora verko.

E. A. Bokarev (Moskvo)

La popolaj komunumoj antaŭenmarŝas, de Taŭ ĝu. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 30 p. 18 x 13 cm. 0,35 gld. (1,4 st.)*

Resumo: Ano de la Centra Komitato de KPC emfazas agrokulturan produktadon kiel bazon por industriigo kaj skizas la historion, strukturon kaj problemojn de la komunumoj.

Vivu la venko de popola milito, de Lin biaŭ. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 79 p. 15 x 9 cm.

Resumo: La ĉina Ministro de Nacia Defendo klarigas per la ekzemplo de la Kontraŭjapana Milito (1937-1945) la teorion de Maŭ zedong pri popola milito: ĝiajn strategion kaj taktikon, la unuecfronton, kaj ĝian hodiaŭan signifon.

La socialisma industriigo kaj la kolektivigo de agrikulturo en Ĉinio, de Bo jibo kaj Liaŭ lujan. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 40 p. 18 x 13 cm. 0,50 gld. (2 st.)*

Resumo: La du artikoloj el 1963 traktas la relativan gravecon de peza kaj malpeza industrio, la neceson de ekonomia memstareco kaj la laŭŝtupan kolektivigon de agrikulturo ĝis la komunumoj.

Leteroj el Ĉinio (N-roj 1-10), de Anna Louise Strong. Novmonda Eldonejo, Pekino, 1965. 116 p. 18 x 13 cm. 1,65 gld. (6,6 st.)*

Resumo: Jen dek leteroj verkitaj inter septembro 1962 kaj julio 1963 de usona komunista ĵurnalistino, tiam 76-jara, kaj originale eldonitaj multoblige aŭ aparte presitaj. Ili traktas tre diversajn temojn de enlanda kaj eksterlanda politiko: Kubo, Hindujo, Sovetunio k.a.

Bestkalendaro 1966. Eld. Reinsteg-Verlag, Germanujo. 12. p. 42 x 30 cm., kun kolorpresitaj pentraĵoj. Tekstoj germana kaj Esperanta. Prezo: 3,60 gld. ink. afranko, mendebla ĉe past. A. Burkhardt, 7261 Gechingen über Calw, Germanujo; pĉk. 102549 Stuttgart.

Dicionário Português-Esperanto, de Ismael Gomes Braga. Dua eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, 1965. 362 p. 18 x 14 cm. (Vortaro portugala-Esperanta). 5000 ekz.

Veterano? de Ismael Gomes Braga. Dua eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, 1965. 231 p. 18 x 14 cm., bind. 1500 ekz. Primovadaj artikoloj.

Mannheim. Eld. Trafika Societo de Mannheim, Germanujo 1965. 20 000 ekz. Kolora turisma faldfolio. Liveras kontraŭ rpk.: Esperantogrupo, T 6/18, 68 Mannheim.

Esperanto: facts and figures about the international language, (faktoj kaj ciferoj pri la int. lingvo). Eld. J. Addis, Kingston House, Ballinteer, Dublin 14, Irlando. Informa faldfolio anglalingva. Prezo: po 1 st. plus afranko por 4 ekz.

La blinduloj kaj la elefanto, de Derrick P. Faux. Serio "Legu kaj lernu" n-ro 5.

Kantoj kaj rakontoj, de diversaj aŭtoroj. Serio "Legu kaj lernu" n-ro 6. Ambaŭ libretojn eld. Faux, Britujo, 1966. Po 24 p. 17 x 11 cm., mult., il. 0,75 gld. (3 st.)*

Ĉasado kun Avêjo, de Ĝaŭ fuhing. Bildoj de Jang jongking. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 20 p. 17 x 19 cm. Kolora infanlibreto. 0,50 gld. (2 st.)*

L' Espéranto vivant, de Pierre Delaire. Eld. la aŭtoro, Orléans, 1965. 7-a eld., 352 p. 21 x 15 cm., kartonbind., il., ofsetita. Lernolibro por franclingvanoj.* (Vidu recenzon de la sesa eldono en majo 1964, p. 92)

Alvoko de l' silento, poemoj de Leandra Rekareo. El la hispana tr. Diego Selso. Eld. la tradukinto, Argentino, 1966. 32 p. 21 x 16 cm., multobl. Dulingva eldono.

LAŬFAKE

Filatelo

- Okaze de la 51-a UK en Budapeŝto la Hungara Filatela Muzeo (Budapeŝto VII., Dob u. 75/81) ekspozicias Esperanto-poŝtmarkojn.

Radio

- Radio Budapeŝto komencis ĉiutage elsendi en Esperanto la 1-an de februaro, interalie pri la preparlaboroj por la 51-a U.K. Vidu detalojn sur p. 59.

Scienco

- Du organizaĵoj — la Societo de Internaciaj Plumamikoj (Japanujo) kaj Urugvaja Esperanto-Societo — planas eldoni seriojn de sciencaj kaj popularsciencaj libroj en Esperanto.

LAŬLANDE

Cejlono

- Komenciĝis neoficiala kurso en la Lernejo de Indiĝena Medicino en Kolombo. Instruas la delegito de UEA, d-ro Dharmatilake.

Ĉeĥoslovakio

- La 15-a Somera Esperanta Tendaro okazos en Lančov en julio, do viziteble survoje al la UK en Budapeŝto. Informas: Kult. d-ĉm Bedřicha Václavka, Třebíč. (foto)

Ĉinujo

- La eldonadon de porinfana k.a. literaturo transprenis de Ĉina Esperanto-Ligo la Fremdlingva Eldonejo. La unuan fojon aperis libro en Esperanto el la Novmonda Eldonejo.

Francujo

- En la televida rubriko "Téléphilatélie" okazis la 11-an de februaro 7-minuta elsendo pri Esperanto kaj filatelo.


Vidu: Grekujo

Grekujo

- Lastatempe tre aktivis la Helena Esperanto-Asocio, organizante ekskursojn, prelegojn, subskribo-kolektadon kaj, eble plej grave, Esperanto-budon en vinkomerca ekspozicio, kiun vizitis 77 500 personoj. (foto)

Hindujo

- Hindilingva libro pri Esperanto estas jam prespreta, dum lernolibro por hindilingvanoj estas ankaŭ preparata. Aŭtoras Aŝvinikumar'.



Vidu: Ĉeĥoslovakio

Hungarujo

- Aperis la unuaj libroj en Esperanto (se ne kalkuli lernolibrojn) de post la Dua Monda Milito: jam eldonitaj estas La Tragedio de l' Homo de Madách, du fotolibroj kaj unu turisma libro. Aliaj planataj inkluzivas verkon pri la malpaco de 1956.

Israelo

- La radio-stacio "Voĉo de Israelo" disaŭdigis dufoje en januaro kvaronhoran intervjuon pri Esperanto en programo de kulturaj novaĵoj.

Libano

- Ges-roj C. Murray el Usono, daŭrigante sian ĉirkaŭmondan vojaĝon, restas 3-4 monatojn en Bejrut. El intervjuo en ĵurnalo "Beirut Daily Star" rezultis kurseto privata. Ges-roj Murray intencas kontakti la libanan edukministerion, kiel ili tion faris antaŭnelonge en Kuvajto.

Nederlando

- Klubojn en 12 urboj vizitis Nikolaj Rytjkov el Moskvo kun programo de deklamaĵoj. Similan vojaĝon en Britujo sekvas laŭplane aliaj. Aliaj landoj, kiuj volus inviti s-ron Rytjkov, bv. kontakti kun UEA, kiu tre rekomendas.

Svedujo

- En la daŭro de unu semajno (18-24 okt.) s-ro Lennart Åberg faris 30 prelegojn pri Unuigintaj Nacioj por pli ol 3000 aŭskultantoj, plejparte en lernejoj.





LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando**

Digna daŭrigo de la tradicio:

SEMINARIO PRI "LI KAJ ŜI"

Germana Esperanto-Junularo okazigis de la 27a de decembro 1965 ĝis la 2a de januaro 1966 la 9an Internacian Seminarion en tre moderne ekipita junulargastejo de Hamburgo. Pri la ĉefa temo "Li kaj ŝi – junaj homoj en la moderna mondo" prelegis prof. d-ro Ivo Lapenna ("Juraj aspektoj de internaciaj geedziĝoj"), d-ro Werner Bormann ("Ekonomiaj problemoj de virina laboro") kaj Michael Zeilinger ("Kio estas amo?" kaj "Ĉu amo estas lernebla?"). La prelegojn kompletigis ampleksaj kaj viglaj diskutoj, i.a. aparta diskutrondo pri interseksaj rilatoj en diversaj landoj.

La seminarianoj – ĉ. 90 – venis el 12 eŭropaj landoj kaj el Aŭstralio, Hindujo, Japanujo kaj Malio. La senato de Hamburgo aranĝis en la urbodomo oficialan akcepton, pri kiu la televido dufoje elsendis filmraporton. Fluraj gazetoj atentigis pri la seminario, dum aliflanke la "Publika Vespero" – malgraŭ alt-nivela programo – ne sukcesis allogi kontentige multajn neesperantistojn.

Kulmino de la distra programparto estis la tradicia Silvestra Balo, kiu daŭris pli ol 6 horojn kaj – krom el dancado – konsistis el du skeĉoj de Schwartz kaj Baghy.

Lige kun la 9a IS okazis la Unua Seminario de TEJO por Edukado de Gvidantoj, en kiu partoprenis 13 nunaj aŭ estontaj funkciuloj de LS. Prelegis prof. Lapenna pri la strukturo de UEA, Günther Becker pri informado kaj Ulrich Lins pri TEJO kaj la Landaj Sekcioj.

U. L.

PERANTOJ DE TEJO

Rumanujo: S-ro Florin Caragea, Popa Petre 28, BUCURESTI-9.

Ĉeĥoslovakujo: S-ro Mikuláš Nevan (prezidanto de Junulara Sekcio de ĈSEK), Horní Stromky 14, PRAHA 3 – Vinohrady.

"MINORITATAJ POPOLOJ"

estas la temo de la 11a Internacia Junulara Kunveno de GEJ, kiu okazos (lige kun la 44a Germana Esperanto-Kongreso) en Bamberg de la 28a de majo ĝis la 4a de junio 1966, do dum kaj post Pentekosto. Estos traktataj kulturo, socio kaj problemoj de minoritatoj, i.a. de keltoj, vaskoj, indianoj kaj maorioj.

Kotizo: 65 GM (ĝis 25 j.) resp. 75 GM (pliaĝuloj). Aliĝilojn kun ĉiuj personaj indikoj bonvolu sendi al: 44a Germana Esperanto-Kongreso, 86 Bamberg, Untere Sandstr. 4, samtempe ĝirante antaŭpagon de 7 resp. 15 GM al la kongresa poŝtĉekkonto Nürnberg 66706 (sur la ĝirilo indiku "por 11a IJK").

Grupo "ANNE FRANK"

Unu el la plej multnombraj kaj viglaj grupoj en Bulgarujo estas tiu en Vraca, "Hristo Botev", kaj ĝia junulara sekcio "Anne Frank". Enjo Daskalov estas ĝia dojeno kaj nun transdonis sian funkcion de prezidanto al Strahil Dimitrov.

La grupo "Anne Frank" honorigis sian prezidanton Daskalov per nomigo "Honora Prezidanto".

(inf. S. Dimitrov)

SKOEVDE

estos la urbo en sud-okcidenta Svedujo kie, dum pentekosto, okazos la jam tradicia Sveda Junular-Renkontiĝo de SEJU. Eksterlandaj gejunuloj: pasigu tiujn tagojn (28-30 majo) en la belega regiono, kiu dum printempo estas kvazaŭ fabellando.

Petu informojn ĉe Klubo Esperantista de Skövde, poŝtfako 177.

UMECO

numero 2 aperis en oktobro 1965. Ĝi estas kvarmonata gazeto, organo de Aŭstralia Esperantista Junulara Asocio.

Adreso: 88 Headingly Rd., Mt. Waverley, Vic. Ni deziras al ĝi belan karieron!


KARIERO

Tiu vorto memorigas nin pri Kuriero, aŭ pli precize: "**Junulara Kuriero**", la organo de la Madagaskara TEJO-sekcio fi. es. ta. ma. Ĝi reaperis post ioma interrompiĝo. Adreso: B.P. 1678, Tananarive.

KARIERO II.

Estas aparta plezuro mencii ĉi tie alispecan karieron, nome tiun de Carlo Minnaja, ĝen. sekr. de TEJO, kaj de Luisella Sergiampietri, TEJO-anino. Ili geedziĝis la 15-an de januaro. Ni prezentas plej korajn gratulojn kaj bondezirojn!

Ankaŭ vi povas ferii en la "Muelejoj de Metilernantoj" (foto). Vidu LJV januaro, p. 14.



51-a UNIVERSALA KONGRESO

Budapest, 30.VII - 6.VIII.1966

Sub la Alta Protektado de S-ro Ödön Kishazi,
Vicprezidanto de la Hungara Popola Respubliko
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 3-5 Rotterdam, la 4an de februaro 1966
Dua Bulteno

La Dua Oficiala Bulteno estas sendita al ĉiuj aliĝintoj. Kun ĝi estas senditaj la mendiloj por loĝado, ekskursoj, bankedo, antaŭ- kaj postkongreso kaj aliaj.

HUNGARA VIZO

TRE GRAVE; NOTU BONE!

Kun ĝojo ni povas komuniki, ke ĉiu kongresano ne loĝanta en popol-demokratia lando povos ricevi la hungaran enirvizon pagante nur la sumon fiksititan por la vizo mem. Tio do signifas, ke ne estas necese antaŭdeponi la sumon de \$ 4 por ĉiu tago da antaŭvidita restado. Sekve, ĉiuj komunikoj rilate la enirvizon (kaj deponsumon, ĝis nun publikigitaj, inkluzive de tiuj en la Dua Bulteno, fariĝis nevalidaj.

La menciitaj kongresanoj devas antaŭpagi al la konstanta adreso de la Kongreso nur la necesajn sumojn por la faritaj mendoj (loĝejo, ekskursoj, TEJO-Kongreso ktp.), ne plu konsiderante la pli frue anoncitajn kondiĉojn. Tiuj, kiuj intertempe jam sendis la postulitan antaŭpagon, povos ricevi ĝin aŭ disponi pri ĝi laŭ siaj deziroj.

Prezo de la vizo

Ni povas samtempe komuniki, ke la kotizo por ricevo de la enirvizo estas reduktita — por la partoprenantoj en la 51-a U.K. kaj en

la TEJO-Kongreso — je 50%.

Valido de la favoraj kondiĉoj

La nuligo de la antaŭdepono de \$ 4 kaj la rabato de 50% por la vizo validas nur por la aliĝintoj al la 51-a U.K. kaj al la TEJO-Kongreso kaj nur por la periodo 23.VII-10.VIII. 1966. Por ĝui tiujn ĉi favorajn kondiĉojn estas necese prezenti al la koncerna ambasado hungara (vidu la adresojn en la Dua Bulteno) invitleteron, kiun disponigos la Loka Kongresa Komitato. Tiun invitleteron LKK sendos al ĉiu aliĝinto, kiu anoncas sin pere de la mendiloj por loĝado aŭ antaŭkongreso aŭ ekskursoj, troviĝantaj en la Dua Bulteno. Oni do aliĝu kiel eble plej baldaŭ. Sen tiu invitletero la ambasadoj ne rajtas doni enirvizon laŭ la supre menciitaj favoraj kondiĉoj.

Ekskursoj

Post traktadoj kun la koncerna instanco kiu prizorgas la dumkongresajn ekskursojn, estas atingita interkonsento, laŭ kiu ni povas anonci malaltigon de la kotizoj por la ekskursoj sur Danubo kaj al Balatono (resp. Eks. A kaj B en la Dua Bulteno). La definitivaj aliĝkotizoj por la menciitaj ekskursoj estas nun resp. 25.— gld (160 ft.) kaj 29.— gld (190 ft.). Ev. jam pagita troa sumo restas je dispono de la paginto. LKK fidis, ke tiuj ĉi ĝojigaj atingajoj instigos multajn hezitatojn al aliĝo al la 51-a. **Statistiko (ĝis 18.2.1966)**

Alĝ. 1, Arg. 2, Aŭstral. 2, Aŭstr. 24, Belg. 28, Braz. 2, Brit. 79, Bulg. 100, Ĉeĥosl. 239, Danl. 31, Finn. 15, Franc. 177, G.D.R. 10, G.F.R. 89, Grekl. 2, Hisp. 10, Hongkongo 1, Hung. 293, Irl. 2, Isr. 7, Ital. 59, Jap. 12, Jug. 14, Meks. 1, Monako 3, Nederl. 99, Norv. 5, Nov-Zel. 1, Poll. 43, Rum. 10, Sov. 6, Sved. 60, Svis. 20, UAR 1, Urugv. 1, Usono 28. Entute 1477 el 36 landoj.

FLUGU KUN U.E.A. AL ISRAELO!

La 52-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Tel-Aviv en 1967. Kiel por Tokio, ankaŭ por tiu ĉi ekstereŭropa Kongreso U.E.A. organizas internacian flugvojaĝon je tre favoraj kondiĉoj.

Neniu maltrafu la okazon vidi tiun ĉi unikan, historiplenan, sanktan, romantikan, antikvan kaj samtempe modernegan landon! Iru rigardi la miraklon de la fruktodona verda lando kreita el dezerto, vizitu la bibliajn lokojn, kie ŝvebas ankoraŭ la agordo de la antikveco. Konatiĝu kun la Esperanto-movado en tiu ĉi multlingva lando. Neniam vi havos okazon je pli favoraj kondiĉoj viziti tiun landon!

Ĉar la cirkonstancoj estas tute diferencaj, ankaŭ la aranĝo de la vojaĝo estas alia, ol por Tokio, nome, ĉi-foje la vojaĝsumo inkluzivas samtempe 10-tagan restadon en Tel-Aviv dum la Kongreso. Post la Kongreso restos aliaj 10 tagoj por restado en la lando kaj ev. partopreni postkongresajn aranĝojn.

Datoj: Provizore la datoj estas fiksitaj je forveturo la 3-an de aŭgusto kaj reveno la 23-an de aŭgusto 1967. Oni forveturos el Amsterdam aŭ/kaj diversaj aliaj eŭropaj urboj, depende de la partoprenantaro.

Hotelo: La kategorioj de hoteloj varias de plej simpla ĝis plej luksa. Ĉiu partoprenanto povos individue elekti la hotelon laŭdezire, kaj laŭ tio varias la tarifo por la tuta vojaĝo. Tiuj, kiuj ne deziras hotelon, ĉar ili estos gastoj ĉe amikoj, bonvolu informi pri tio. Supozeble, ankaŭ por tio solvo estos trovebla.

Prezoj: Por la flugvojaĝo tien-reen plus 10-taga restado en Tel-Aviv en hotelo kun matenmanĝo la prezoj varias ekde 830.— gld (3320 steloj) por tre simpla hotelo (tamen ĉambroj kun duŝo) ĝis 1335.— gld (5340 steloj) por plej luksa hotelo (Hilton k.s.). Inter tiuj du prezoj troviĝas 4 aliaj kategorioj de bonaj kaj tre bonaj hoteloj je diversaj prezoj. La prezoj inkluzivas ankaŭ servmonon en la hoteloj. Ĉiuj hoteloj respondos al la normalaj postuloj de pureco kaj bonordo kaj estos rigarditaj de la Konstanta Kongresa Sekretario persone, antaŭ ol ili estos rekomenditaj al la Kongresanoj.

Interesitoj por la vojaĝo bonvolu kiel eble plej baldaŭ anonci sin provizore al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando, kiu volonte donos ĉiujn pliajn informojn.

M. H. Vermaas, Direktorino C.O.



esperanto
marto 1966

PRI LA MEMBRO-STATISTIKO

Kiel kutime — kvankam ni ĉiam varme petas pri ĝustatempa pago — alvenis ankoraŭ pluraj kotizpagoj por 1965 post la jarfino, tiel ke la rezultoj montritaj en la laŭlanda statistiko en tiu ĉi numero diferencas de la ciferoj publikigitaj en la februara numero. La fina cifero kreskis ankoraŭ de 31.329 al 31.591. La nombro de individuaj membroj en 1965 estis 7.260, kontraŭ 7.138 en 1964. Tio estas bela kresko, sed ne sufiĉa. Restas la gravega demando, kial 24.331 asociaj membroj en 28 landoj ankoraŭ ne trovis la vojon al individua membreco de UEA, kiu havigus al ili tiun utilegan informilon, la Jarlibron, kaj la oficialan organon "Esperanto".

Inter ili oni varbu plej energie en la kadro de la "Kampanjo por nova milo", pri kiu ni detale skribis sur paĝoj 201 kaj 221 de la decembra numero 1965 de tiu ĉi revuo. Oni tion faru, unue, por tiuj esperantistoj mem. Ja Esperanto estas tiel esence internacia afero, ke apenaŭ eblas esti centpocenta esperantisto ne partoprenante individue al internacia organizaĵo. Due, por UEA, ĉar ja estas maleble al ĝi daŭrigi sian ĉiam pli ampleksan kaj multflankan agadon por la Internacia lingvo sen fortega morala kaj materia apogo flanke de la tuta esperantistaro.

Tial, ankoraŭfoje ni insiste petas al ĉiuj legantoj de tiuj ĉi linioj plej energie partopreni en la Kampanjo por nova Milo.

M. H. Vermaas

Direktorino C.O.

LAŬLANDA MEMBRO

Lando	AM	MJ	MA	MS	DM	HM	J-MJ	J-MA	MA-K	kune
Albanujo	—	2	—	—	—	—	—	—	—	2
Alĝerio	—	—	5	—	1	—	—	—	—	6
Angolo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Antiloj	—	—	3	—	—	—	—	—	—	3
Argentino	350	1	35	—	11	—	—	1	1	399
Aŭstralio	158	20	90	6	18	—	—	1	1	294
Aŭstrujo	300	13	80	3	7	3	—	3	3	412
Belgujo	500	25	115	8	11	1	2	2	—	664
Bolivio	—	—	1	—	—	—	—	—	1	2
Brazilo	815	28	180	30	34	1	4	3	1	1096
Britujo	738	75	367	45	69	3	5	17	12	1331
Bulgarujo	4100	16	121	—	5	—	—	7	1	4250
Cejlono	—	—	2	—	2	—	—	—	—	4
Cipro	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Ĉeĥoslovakujo	—	8	119	—	4	1	—	4	1	137
Ĉilio	—	—	1	—	1	—	—	—	—	2
Ĉinujo	—	—	6	—	—	—	—	—	—	6
Danlando	832	33	136	20	8	—	1	4	3	1037
Ebura Bordo	—	1	1	—	—	—	—	—	—	2
Egiptujo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Ekvadoro	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Etiopio	—	—	1	—	1	—	—	—	—	2
Finnlando	—	70	185	13	12	1	4	10	5	300
Francujo	1412	75	440	22	58	7	4	16	16	2050
Gano	—	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Germanujo	1700	71	360	31	39	—	5	12	13	2231
Grekujo	120	—	13	—	—	—	—	1	1	135
Gvatemalo	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Hindujo	—	18	13	—	—	—	—	—	1	32
Hispanujo	490	18	209	7	10	—	1	7	1	743
Honkongo	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Hungarujo	2500	2	83	—	—	3	1	3	1	2593
Indonezio	—	—	4	—	—	—	—	—	—	4
Irano	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Irlando	—	—	5	—	1	—	1	—	—	7
Islando	—	—	20	1	3	—	—	—	—	24
Israelo	160	4	18	—	4	—	—	—	—	186
Italujo	1000	36	233	5	6	1	3	8	14	1306
Japanujo	1400	10	222	1	5	1	—	25	33	1697
Jugoslavio	1513	16	142	6	15	—	1	22	10	1725
Kameruno	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Kanado	154	4	42	7	6	—	—	2	—	215
Kenjo	—	—	2	—	1	—	—	—	—	3

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, 75-PARIS (16e), Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la januaran numeron.

RADIO ROMA. 6-III, Tra la literaturo; 13-III, Novaĵoj el Italujo; 20-III, Italaj kanzonoj en Esperanto; 27-III, La kastelo de Gradara; 3-IV, La itala geologo Antonio Stoppani; 10-IV, Italaj regionoj: Piemonto; 17-IV, La romanika skulptarto en Modena: Wiligelmo; 24-IV, Leterkesto. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro: Luigi Minnaja.

RADIO MADRID, dum la programo "Panorama Cultural" de la stacio Radio Juventud de España, per modulita frekvenco, dissendas ĉiujn de 22.45 ĝis 22.50 informojn pri Esperanto en nacia lingvo. Prelegantoj: S-ro Gomez kaj Enfedaque.

RADIO BUDAPEST komencis la 1-an de februaro elsendadi ĉiutage en Esperanto. Ĝi estas do la dua stacio — kun Varsovio — kiu uzas ĉiutage Esperanton. Horoj: 20.30-20.45 laŭ Mezeŭropa tempo (19.30-19.45 laŭ Greenwich). Ondo: 240 m. (1250 kcs), 41,6 m. (7220 kcs), 48,1 m. (6234 kcs). Adreso: Radio Budapest, Budapest VIII., Bródy Sándor u. 5-7, Hungarujo.

La elsendoj prezentas aktualajn sciigojn pri mondaj okazaĵoj, sportajn raportojn, novaĵojn pri la Esperanto-movado en Hungarujo kaj pri la preparoj por la 51-a Universala Kongreso, kaj konatigajn programojn pri la vivo, popolo, kutimoj, pejzaĝoj ktp. de la kongresa lando. Oni tre deziras ricevi skribajn opiniojn de aŭskultantoj.

POLA RADIO (Esperantaj disaŭdigoj, Pola Radio, Varsovio) senpage sendas sian kolorpresitan programfolion al ĉiuj petantoj.



STATISTIKO 1965

Lando	AM	MJ	MA	MS	DM	HM	J-MJ	J-MA	MA-K	kune
Kolombio	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Kongo/Brazzav.	—	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Kongo/Leop.	—	—	6	—	—	—	—	2	—	8
Koreujo	—	—	11	—	—	—	—	1	5	17
Kostariko	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Kubo	—	—	2	—	1	—	—	—	—	3
Kuvajto	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Libano	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Liberio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Liĥtenŝtejno	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Luksemburgo	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
Madagaskaro	15	6	6	—	—	—	4	3	2	36
Makao	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Malio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Malto	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Maroko	—	1	3	—	1	—	—	—	—	5
Maŭritanio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Meksiko	—	1	9	—	3	—	—	—	—	13
Monako	40	1	6	—	—	—	—	—	—	47
Mongolujo	—	—	2	—	—	—	—	—	—	2
Mozambiko	—	—	3	—	—	—	—	—	—	3
Nederlando	826	68	326	23	63	4	1	11	3	1325
Norvegujo	460	11	74	5	12	1	—	2	1	566
Novzelando	166	36	71	6	22	—	—	2	1	304
Pakistano	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Peruo	—	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Pollando	3100	1	290	—	2	—	—	10	8	3411
Portugalujo	—	—	9	2	2	3	—	—	—	16
Portoriko	—	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Rumanujo	—	3	18	—	—	—	—	—	2	23
Senegalio	—	1	—	1	—	—	—	—	—	2
Sovetunio	—	1	116	—	1	—	—	9	4	131
Sudaŝriko	—	1	16	2	6	—	—	—	—	25
Svazilando	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Svedujo	1000	107	319	81	34	—	2	2	7	1552
Svislando	100	96	110	8	44	1	2	3	2	366
Tanzanio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Tunizio	—	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Turkujo	—	—	1	—	—	—	—	1	1	3
Urugvajo	50	1	6	—	1	1	—	—	—	59
Usono	332	46	235	33	47	2	3	24	11	733
Venezuelo	—	—	12	—	—	—	—	—	—	12
85 landoj	24331	928	4925	368	576	34	44	219	166	31591

esperanto
marto 1966

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1966

Stato je la 31-a de januaro

KONKURSO I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Finnlando	3160	1765	55,85
2. Francujo	7752	4162	53,69
3. Svislando	2459	1320	53,68
4. Usono	4526	2160	47,72
5. Svedujo	7180	3225	44,92
6. Danlando	3099	1385	44,69
7. Nederlando	5975	2414	40,40
8. Britujo	6691	2535	37,89
9. Hispanujo	2860	840	29,37
10. Brazilo	4142	1177	28,42
11. Italujo	4253	1075	25,28
12. Germanujo	7221	1770	24,51
13. Belgujo	2055	455	22,14
14. Jugoslavio	5560	1000	17,99
15. Japanujo	3965	510	12,86


KONKURSO II

1. Kanado	842	595	70,67
2. Grekujo	270	136	50,37
3. Israelo	460	210	45,65
4. Argentino	905	40	44,20
5. Aŭstrujo	1475	620	42,03
6. Aŭstralio	1475	560	37,97
7. Norvegujo	1755	555	31,62
8. Sudafriko	250	70	28,—
9. NovZelando	1481	410	27,68
10. Madagaskaro	250	30	12,—
11. Islando	250	20	8,—

(Vidu la regulojn sur paĝo 39).

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Koresponda Servo Mondskala, unu el la specialaj kulturaj agadoj de UEA, daŭre kreskas de post sia refondiĝo en 1960: pruvo pri ĝia utileco kaj efika servo. La histogramo montras la nombron de petoj responditaj. En 1965 KSM kunligis 783 parojn da korespondantoj. Vidu la Jarlibron 1965/I, p. 141-2.



POSTMARK-KOLEKTADO

Sendu ĉiujn p.m. al la nova adreso: s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, Brønshøj, Kopenhago.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Béguin, s-ro P.A., Le Locle, Svislando.
Bettges, s-ro Johann, Duisburg, Germanujo.
Bulla, s-ro Wilhelm, Recklinghausen, Germ.
Ekberg, s-ro R.E., London, Britujo
Gadd, s-ro Erik, Imatra, Finnlando.
Livić, s-ro Dragomir, Zemun-Beograd, Jug.
Marchiori, d-ro Giovanni, Verona, Italujo.
Nikolić, s-ro Dančika, Beograd, Jugoslavio.
Parrish, s-ino Poula E., Los Angeles, Usono.
Schorcht, s-ro Armin, Hannover, Germanujo.

Schulze, s-ino Cath. L., Hillsborough, Calif.
Serres Pérez, s-ro Juan, Barcelona, Hispanujo.
Treude, d-ro Wilhelm, München, Germanujo.
Wieczorek, s-ro Klaus, Hannover, Germanujo.
Wolfskehl, s-ino E., Selsey, Britujo.
Zamlinsky, s-ro C. J., South San Gabriel, U.S.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1966

43 Klumair, s-ro Karl, Aŭstrujo. 44 Jaumotte, s-ro M.; 45 Verstraeten, s-ro Jules, Belgujo. 46 Dunbar, s-ro R.; 47 Kennedy, s-ro D.; 48 Kennedy, s-ino M.; 49 Mallett, f-ino E.E.; 50 Saunders, s-ino A.J.; Britujo. 51 Hou, s-ro C.H.; 52 Riisbjerg, f-ino Gudrun; 53 Trier, s-ro Bent Sejr; 54 Ziegler, s-ro Sven, Danlando. 55 Koi-vuniemi, f-ino Helmi; 56 Narvala, s-ro Nils Gösta; 57 Pyykönen, s-ro Juho; 58 Stoor, s-ino Brita; 59 Vuolo, s-ro Lauri, Finnlando. 60 Llech-Walter, s-ro R.; 61 Romano-Joly, s-ro Michel, Francujo. 62 Bily, s-ro Harry; 63 Kaukal, s-ro W.; 64 Knauss, s-ro Wilhelm; 65 Markuse, s-ro Waldemar; 66 Wagner, s-ro Hermann, Germanujo. 67 Gruppo Esperantista "Giorgio Canuto", Italujo. 68 Adelaar, f-ino L.; 69 Hoekma, s-ro A.G.; 70 Jonker, f-ino M.T.; Nederlando. 71 Bugge-Paulsen, kapt. R.; 72 Engen, s-ro Per, Norvegujo. 73 Ahlin, s-ro E.V.; 74 Almen, s-ro P.; 75 Asplund, f-ino Mary; 76 Bengtsson, s-ro Karl; 77 Björklund, s-ro F.; 78 Brandemar, s-ro Nils; 79 Dahl, s-ro Einar; 80 Enström, f-ino M.L.; 81 Fingalsson, s-ro B.; 82 Frode, s-ro O.; 83 Johansson, s-ro Erik; 84 Lagerkrantz, s-ro L.; 85 Lidell, s-ro Ville; 86 Lind, f-ino E.; 87 Lundquist, f-ino Gurli; 88 Moberg, s-ro Karl J.; 89 Nordström, s-ino G.; 90 Olsson, s-ro Hj.; 91 Pelz, s-ino Maud; 92 Pettersson, s-ro Folke; 93 Stenström, s-ro John; 94 Tell, s-ro Leander; 95 Turner, s-ro Fred; 96 Wedholm, s-ino Anna, Svedujo. 97 Baur, d-ro A., Svisujo. 98 Becquet, s-ro C.A.; 99 Belinfante, d-ro F.J.; 100 Cole, lt. John A.; 101 Cook, s-ro Bernard M.; 102 Crane, s-ro Clarkson; 103 Hedges, s-ro E.; 104 Hitke, s-ro Kurt; 105 Knox, s-ro Wm. A.; 106 Milsted, s-ro H.B.; 107 Oehler, s-ro René; 108 Simon, s-ro W.; 109 Simpson, s-ro W.P.; 110 Solzbacher, d-ro William; 111 Ziller, s-ro Richard R., Usono.

DONACIOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Germanujo: Bulla, s-ro V., 5,—. Kanado: Gillam, s-ino A., 49,50. Nederlando: Fischer, s-ro J.Th., 5,—. Usono: Murray, s-ro J. H., 11,70.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (Gld.)

Usono: Murray, s-ro J.H., 11,70.

FONDAJO CANUTO

Lapenna, prof. I., Britujo: 4 MA. N.N., Finnlando: 4 MA.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

Aŭtografojn de elstaraj eminentuloj tutmon-
daj kolektas, interŝanĝas, aĉetas: Giovanni
Saggioli, corso Vittorio Emanuele 6, Padova,
Italujo.

Eldonistoj! Nia librovendejo havos ekde
1.4.66 Esperanto-fakon. Konatigu viajn kondi-
ĉojn kaj sendu prospektojn al: Librairie
Française, Kurfürstendamm 211, Berlin 15,
Germanujo. Represo petata. Dankon.

Esperanto-rondeto Strojáreň Piesok, poŝto
Podbrezová, Ĉeĥoslovakio, aranĝos letervespe-
ron dum Pasko, (10.4.1966). Bonvolu sendi bild-
kartojn, leterojn, esperantaĵojn. Korespond-
petoj bonvenaj, skribu amase! Ĉiu sendinto
ricevos rekompencan!

Okazaĵoj en la naturo aspektas kvazaŭ re-
zulto de intenco, sed en la regiono de la homo
ĝenerala sperto estas, ke intenco troviĝas nur
ĉe vivaj estaĵoj. Ĉu do troviĝas viva estaĵo aŭ
vivaj estaĵoj malantaŭ la fortoj de la universo
kaj la naturo? Petu senpagan ilustritan fald-
prospekton ĉe Martinus-Instituto, Marien-
dalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Nia grupo deziras viglan korespondadon kun
ĉiuj landoj: knabinoj 19-, 14-, 13- jaraj, sin-
joroj 40-, 25- jaraj. Adreso: Margret Schadt,
Merkersdorf 27, A-2082 Hardegg, N.Ö. Aŭstrujo.

Teozofoj - Esperantistoj kiuj intencas part-
opreni la mondan kongreson de Teozofia So-
cieto, kiu okazos en Salzburg de la 14-a ĝis la
22-a de julio 1966, bonvolu sin anonci al Renato
Bisi — Viale D'Annunzio 77 — Trieste (Italujo).

Las-Vegas-E-Klubo (muzeo kaj biblioteko),
City Hall Annex, Nevada, Usono deziras pli-
vastigi sian membrecon per bildkartoj de tuta
mondo, al la direktoroj de la sekvaj Las-

Vegas-Mezlernejoj; skribu al: Rancho High
School, aŭ Las Vegas High School, aŭ Western
High School, kaj la University of Southern
Nevada. Donu nian nomon kaj adreson!

Tiuj kiuj sendos al mi filatele afrankitan
bildkarton, ricevos la saman miaflanke. S-ino
M. F. v. Dongen, postbus 268, s' Hertogenbosch,
Nederlando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn,
ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por
lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de
UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins,
63-Clermont-Fd. (PdD) Francujo, kiu peras
adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Nekatolikoj povas senpage ricevi la dumona-
tan revuon "Vojo Vero Vivo" kun informoj
pri la katolika religio. Skribu klare viajn
nomon kaj adreson al la Sekretariejo de la
"Internacia Katolika Informejo", Gasthuis-
ring 54, Tilburg, Nederlando.

Intencante aranĝi propagandcele efikan
porinstruistan Esperanto-ekspozicion en kadro
de instruista ĝeneralkunveno en Linz, kie estis
pasintjare inaŭgurita Zamenhof-monumento,
mi kolektas interalie unuataĝajn kovertojn el
ĉiuj ekstereŭropaj landoj. Interŝanĝe mi sen-
dos bele afrankitajn aŭstriaĵajn unuataĝajn
kovertojn, pecon por peco. Partoprenontoj en
la ĝeneralkunsido antaŭvideble pli ol mil. —
Hans Jungschaffer, lernejdirektoro en A-4910
Ried i. I., Aŭstrujo.

Dankanonceto. Al ĉiuj esperantistoj kiuj donis
al ni moralan aŭ materialan helpon, ni korege
dankas. Apartan amikdankon al francaj kaj
italaj esperantistoj. Slobodan Ješić, kun fami-
lio, 1935 W. Schiller, Chicago, Usono.

ANONCETOJ

(Pri plenumo de
promesoj en anoncetoj
respondecas sole nur
la anoncintoj.)

KOMPLETAJ JARKOLEKTOJ

REVUO ESPERANTO 1965 tolbindita volumo, ora
surpreso, 224 + 48
paĝoj, konservindaj
artikoloj.

Por MA 1965: 7,- gld.; por aliaj: 14,- gld.

LA PRAKTIKO 1965: 7,50 gld. nebindita jarkolekto,
176 grandaj paĝoj,
ink. afrankon multaj ilustraĵoj.

Speciala oferto: jarkolekto 1964: 5,- gld.


Rapidu! Ambaŭ kvantoj estas limigitaj!

LINGVOLOGIA REVUO

Esperantlingva fakeldonaĵo por lingvologio,
la kalkuleca lingvoscienco. La unua numero
aperinta. Aperos dufoje en jaro. Estos sen-
page sendata de la eldonanto kaj redaktoro
Emil Hanhiniemi, P. O. Box 764, Ingham,
N. Queensland, Aŭstralio.

TIU ĈI NUMERO ESTAS LA LASTA

KIUN VI RICEVAS ĜIS VI ESTOS PAGINTA VIAN KOTIZON 1966.
ZORGU, KE NENIU NUMERO MANKOS AL VI: DO, SE VI FORGESIS ĜIS NUN,
PAGU TUJ!



LA UNUA NATURSCIENCA REVUO EN LA INTERNACIA LINGVO

Abono per UEA:
5,40 gld. aŭ
1,50 us. dol.
jare (3 n-roj)

Helsingör

La 17.-24. de julio 1966 okazos la internaciaj feriaj Esp-kursoj (perfektiga - konversacia - kaj prepara kurso por naturmetodaj instru-ontoj) en La internacia Altlernejo en Helsingör (Danlando), belega loko kun parko kaj ĉe banstrando. Ĉiuj kore bonvenaj. Senpaga prospekto havebla ĉe

L. Friis Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

N.B. La loko de la aŭtunaj feriaj kursoj ne plu estas Vejle, sed la altlernejo JUNAJ HEJMOJ en Aarhus. Prospekto pri tiuj aranĝoj aperos 1/5.

NOVA ELDONO EN LA FAMA SERIO
ORIENTO-OKCIDENTO (N-RO 6)

REĜO LEAR



Bind.	160
16,50 gld.	paĝoj
Broŝ.	21 x
14,— gld.	15 cm.

Unu el la plej grandaj kaj emociaj dramoj de William Shakespeare, **REĜO LEAR** nun aperis en la definitiva traduko de

K. KALOCSAY,

memore al la 350-jara datreveno de la morto de la aŭtoro. Brilkvalita teksto, bela bindo, formato de "Naŭzo", "Kalevala" ktp.

Eldono de Universala Esperanto-Asocio

DANTE ALIGHIERI :

La Dia Komedio

Serio Oriento-Okcidento, speciala eldono



Tradukis Giovanni Peterlongo

Ilustraĵoj de Botticelli

Paralelaj tekstoj itala kaj Esperanta

Detala komentario

Prezo: 36,— gld. (144 st.)

Sola vendrajto por la Esperanto-Movado:
UEA

La ĉie ŝatata rektametoda lernolibro

PRIVILEGIA VOJO

al lingvoscio: Esperanto

Jam 16 500 ekzempleroj presitaj de la internacia kaj naciaj eldonoj! Bone uzebla tiel por kursoj kiel por memlernantoj. Instruas ĉiujn novajn vortojn per simboloj, ilustraĵoj aŭ per jam lernitaj vortoj; kontinua teksto.

Mendebla kun instrukcioj en araba, franca, germana, hispana, itala, nederlanda, norvega, portugala k.a. lingvoj laŭ elekto.

Prezo: 13 steloj (3,25 gld.) plus afranko. Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA.

LERNOLIBRO POR LA TUTA MONDO